

1979 marto

72-a jaro


n-ro 879 (3)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Albert
Einstein:
Jubileo
de amiko

Vi trovos

la unuajn paĝojn de ĉi tiu numero aspekti kvazaŭ bone presita eldono de "Budapeŝta informilo", tiom da hungara materialo enestas tiujn paĝojn. Nu, estas tiel, ke simple multo okazas en Hungario. Eble la Movado en neniuj aliaj landoj de la mondo tiel intense moviĝas kiel en tiu lando de unuavide flegmaj ebenaĵoj, fajra muziko kaj gorgdetrua papriko. La paĝoj 45–48 klopodas instrui. Do, ne evitu lerni. Tiel vi meritos feriojn, pri kio aperas du paĝoj da proponoj en ĉi tiu numero. Cetere — vi jam rimarkis, ke "cetere", "nu", "do" kaj kelkaj aliaj similaĵoj estas la plej ŝatataj vortoj en ĉi tiu rubriko — nia februara numero ne iris la kutiman poŝtan vojon. Ni eksperimentas (pro la kostoj) kun britoj kaj Londono. Parto de vi rimarkos, ke ni jam rezignis pri tiu eksperimentado. Nu, havu belan marton kaj, do, ĝis aprilo, kiu cetere nun urĝas.

Enhavo

- 41 Lernejaj reformoj kaj Esperanto: Hungara sperto (prof. d-ro István Szerdahelyi)
- 43 Informoj de CED: Konferenco en Budapeŝto (d-ro D. Blanke)
- 44 Iniciatoj: Sonrevuo ekas; Landa agado: Gastoj en Malto
- 45 La mondo ĉirkaŭ ni: Bezono de edukado al tutmondeco (Robert Muller)
- 49 Recenzoj: "La morto de la ĉielarko" (B. Ragnarsson); "Vage tra la dimensioj" (James F. Cool); "Sciencaj komunikaĵoj 1977", "Sciencaj komunikaĵoj 1978" (R. Vetter); "Jes, Esperanto estas vera lingvo", "Esperantologiaj kajeroj 1", "Vorto kaj vortelemento en Esperanto" (Naokazu Kawasaki); "Esperanto sen antaŭjuĝoj" (Boris Kolker)
- 51 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 52 Leterkesto (Karlsson, Daŝgupto, Ergoto, Conterno, Hartl, Briscoe, Fantom, Hafstein Jónsson)
- 53 Kalendaro: Kien iri dum duona jaro?
- 55 TEJO-paĝo: Agnosko kaj . . . mono; El poŝtosako; Anonco
- 56 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 57 Esperanto en radio
- 58 La membraro de UEA en 1978 (statistiko); Oficiala informilo
- 59 Ekzameno E (Bernard Golden); Anoncoj
- 60 Anoncetoj

La kovrilo

La 14an de marto estos la centa datreveno de la naskiĝo de Albert Einstein (1879-1955). La tuta mondo markos tiun jubileon, kiun ankaŭ ni modeste notas per la kovrila bildo. Multaj emas konsideri Einstein la plej granda nomo en la tuta historio de la scienco. Li patris la teorion de relativeco kaj heroldis la atoman epokon. Malmulto en la moderna fiziko ne fontis el liaj revoluciaj ideoj pri la kosmo kaj tempo. Einstein estas la sola sciencisto, kiu fariĝis kulta idolo eĉ inter siaj kolegoj sciencistoj. Tamen, tiu grandioza genio neniam distanciĝis de la plej simpla homeco kaj kun junula vervo kuraĝe kontraŭis la sociajn maljustaĵojn. Li trovis tempon mediti ankaŭ pri niaj temoj. En la libro "Pri internacia lingvo dum jarcentoj", p.118 (vidu anoncon pri tiu libro sur la paĝo 59), oni legas jenan eldiron de Einstein: "Por la internacia komunikado la internacia interkomunikiĝo helpe de la internacia lingvo ne estas nur neceso, sed memkomprenebla afero. Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de la lingvo internacia." Mankas klaraj fontindikoj pri tiu eldiro de Einstein. Tamen, ĝi ja ŝajnas tre probable ligebla al la genienco de Einstein, ĉar tia revoluciiginto de la homaj konceptoj pri la kosmo kaj pri si mem estis kvazaŭ destinita por kompreni ankaŭ la revolucion en la internacia komunikado. Li estis judo, naskiĝinta en Germanio, vivinta en Italio, Svislando kaj Usono; li devis mem sperti iom da komunikaj problemoj; li do devis esti amika al la ideo de la internacia lingvo. Ĉio ĉi estas nur plia kialo por kuncelebri.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,—gld). Unuopa ekz. 3,—gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo, eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) 259 8821.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Milanówek, Pollando; telefono (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-ino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario.

Hungara sperto

Prof. Szerdahelyi prilumas ĉi tie cirkonstancojn, kiuj kondukis al grava rekono de Esperanto en la kadro de la hungara eduka sistemo. Kvankam tiu rekono ne estas unika (similaj decidoj jam okazis ekz. en la baltaj soveta respublikoj), la rekono en Hungario verŝajne en la praktiko montriĝos la plej grava, ĉar en tiu lando jam dekon da jaroj okazas sistema kaj oficiala edukado de kvalifikitaj instruistoj de la Internacia Lingvo. En la fono de la hungara decido sendube rolas ankaŭ la aparte intensa informa laboro, kiu okazas en tiu lando.

NI POVAS (kaj ni devas) nur ripeti la milfoje jam esprimitan tezon: la vojo al la socia plenrajtigo de Esperanto kondukas tra la lernejoj. La signo, ke iu ŝtato rekonas Esperanton, kiel kontaktan lingvon, uzeblan en internaciaj rilatoj estas, ke la ŝtato vicigas ĝin inter tiujn lingvojn, kiuj jam estas akceptitaj kiel tiaj. La fakto, ke Esperanto estas en neniuj ŝtato enkadrigita en la lerneja sistemo demonstras, ke neniuj ŝtato rekonis ĝis nun Esperanton, kiel plenrajtan, plenvaloran vehiklan lingvon. Dum naŭdek jaroj ĉi-terene nenio ŝanĝiĝis. Anstataŭ esplori la kaŭzojn de tiu inertececo, ni prezentas sube tiujn spertojn, kiujn ni akiris dum la lastaj ĉ. 10 jaroj en Hungario. Tiuj ĉi spertoj povas eble servi por unuj kiel sekvendaj, por aliaj eble kiel evitendaj.

La karaktero de la por-Esperanta lerneja politiko en Hungario kvalite ŝanĝiĝis per tio, ke en la lernojaro 1966/67 ekfunkciis en la Budapeŝta Universitato la fako "Esperanto: lingvo kaj literaturo". Ekde tiu tempo ŝanĝiĝis ankaŭ la problemaro de la lerneja instruado de Esperanto (sur ĉiu nivelo), ĉar ĝia scienca esploro ne plu estas afero de socia movado, sed havas oficialan, ŝtate agnoskitan institucion.

Kiam en la kadro de Hungara Scienca Akademio fondiĝis la Subkomisiono pri la Alproprigo de Fremdaj Lingvoj (apartenanta al la Laborkomisiono pri Matematika kaj Aplikata Lingvistiko de la Akademia Sekcio pri Lingvo- kaj Literatur-Scienco) kies tasko estis pri-labori la perspektivan lernejan reformon por la jaro 1990, — la fakgvidanto de la universitata fako estis invitita (23.12.1971) esti membro de la Subkomisiono kaj reprezenti tie la Internacian Lingvon.

Tiu fakto estas nepre emfazenda, ĉar estas neimageble, ke manke de tio la estraro de la Hungara Scienca Akademio estus invitinta iun reprezentanton de neoficiala, neŝtata, t.n. socia organizaĵo. En tiu okazo Esperanto ne estus havinta reprezentanton en la Subkomisiono.

La dua kaŭzo, kiu devigis la Laborkomisionon priatenti la Internacian Lingvon, estis, ke Esperanto (en diversaj formoj) jam estas en la lernejoj. Eĉ: Esperanto

estas apud la grandtrafikaj (R, A, F, G)* lingvoj la sola, kiu estas instruata en kelkaj bazaj lernejoj laŭ t.n. fakigita programo. Jen la skemo de tiu fakigita programo:

Lernojaro	3a	4a	5a	6a	7a	8a
Semajnaj studhoroj	3	3	5	5	5	5

La Laborkomisiono unue esploris la momentan situacion. En ĝia baza dokumento (*La stato kaj evoluig-eblecoj de la instruado de fremdaj lingvoj*, majo 1974) la situacio de la fremdaj lingvoj, instruataj en la bazaj lernejoj laŭ fakigita programo estis jena:

Tabelo 1

	Lernojaro 1973/74			Lernojaro 1976/77		
Lingvo	Lernejoj	Klasoj	Lernantoj	Lernejoj	Klasoj	Lernantoj
R	232	1015,5	26 027	226	1052	27 461
A	33	161	4 491	41	227	5 776
F	15	86,5	1 694	14	81	2 255
G	31	140	3 795	34	188	4 548
E-o	3	10	178	4	12	256

Eĉ pli favoran bildon montras la statistiko de nedevegaj lingvokursoj:

Tabelo 2

La nedevege (fakultative) instruataj fremdaj lingvoj (1973/74) laŭ la nombro de lernantoj:

Lingvo	Baza lernejo	Mezlernejo (Gimnazio)	
		Lingvokurso	Studrondo
A	2007	1561	1679
F	289	463	643
G	8836	1290	1827
H	-	14	11
I	113	90	83
L	-	125	104
E-o	464	132	41
Ceteraj	-	276	126

Rim. Ĉe la bazaj lernejoj mankas la indicoj pri la studrondoj. Al "ceteraj" apartenas la sekvaj lingvoj: serbo-kroata, slovena, slovaka kaj rumana.

La evoluadon de Eo lerneja instruado montras la suba statistiko, farita ne de la Ministerio, sed de la Lerneja Komisiono de HEA:

Tabelo 3

	Lernojaro	
	1973/74	1976/77
Bazaj lernejoj (ĉiuj formoj)	800	1696
Mezlernejoj	132	165
Universitato, altlernejoj	89	116

El la tabeloj evidentiĝas, ke en la bazaj lernejoj, apud la kvar "grandtrafikaj" lingvoj (R, A, F, G), nur Esperanto estas instruata laŭ fakigita programo (Tabelo 1), kaj kiel fakultativa studobjekto en bazaj lernejoj Esperanto estas la tria lingvo (post la G kaj A), en mezlernejoj ĝi antaŭas la italan kaj hispanan! (Tiu ĉi tre rimarkenda sukceso laŭdas la elstaran organizan/fakan

* La mallongigoj por la lingvoj signifas: A - angla, E-o - Esperanto, F - franca, G - germana, H - hispana, I - itala, L - latina, R - rusa.

laboron de la prezidantino de la Instru-Komitato de HEA, prof. Zsuzsa Barcsay).

Malgraŭ tiuj ĉi elokventaj ciferoj kaj malgraŭ ĉiuj klopodoj de la subskribinto, kiu ne ĉesis ĉiuokaze atentigi la Subkomisionon pri tiuj (kaj aliaj) faktoj, la unua konceptaĵo de la "Proponoj" ne estis favora por Esperanto. Ni citas ĉi tie parton, laŭvorte (en traduko):

La opinio de fakuloj rilate la lernejan instruadon de Esperanto principe estas unueca, sed la publika opinio tiun ne aŭ nesufiĉe konas.

1. *Esperanto havis en la periodo inter la du mondmilitoj sendube elstaran rolon en la maldekstrula movado: tre multaj per la lernado de Esperanto povis akiri plus-eblecojn por organizi la progresivajn fortojn. Sed estas dubo, ĉu la estinta rolo de Esperanto en la hungara kaj internacia laborista movado estas sufiĉa motivo por ke la adeptoj de la lingvo Esperanto insistu pri ĝia lerneja instruado.*

2. *Oni ofte povas aŭdi, ke Esperanto povas anstataŭi la latinan lingvon, kiel fundamento de la hindeŭropaj lingvoj. Ni aŭdis ankaŭ tian argumentadon, ke oni komencu la fremdlingvan instruadon per Esperanto anstataŭ per la rusa.*

3. *Laŭ la opinio de la fakuloj oni povas ebligi la instruadon de Esperanto, kiel artefarita lingvo en eksterlernejaj kadroj (studrondoj, student-rondoj).*

Estas notinde, ke nek Esperanto nek la aliaj artefaritaj lingvoj havas tiajn spertojn en la aliaj socialismaj landoj aŭ en kiu ajn lando, sur kiuj oni povus bazi la lernejan instruadon de Esperanto. Krom tio, pro la jam tre malvasta fremdlingva hor-kadro, la enkonduko de Esperanto malfavore influus la instruadon de la aliaj fremdaj lingvoj.

Resume: Nuntempe, tiel el ekonomia kiel el socia vidpunktoj, ni konsideras unua tasko la instruadon de la rusa lingvo kaj dua vivanta fremda lingvo; la enkondukon de Esperanto en la lernejan instruadon provizore ni ne konsideras aktuala. (p. 53-54)

Post tiu ĉi decido la subskribinto prilaboris kontraŭproponon. Tiu kontraŭpropono ("La morgaŭo de nia fremdlingva instruado") aperis en la oficiala revuo de

la Ministerio pri Instruado, *Köznevelés* (Publika edukado), Budapest, 1977 10 21, 34: 6-7. La artikolo aperis represita en la Jarlibro de la hungarlingva revuo de HEA, *Világ és Nyelv* (Mondo kaj lingvo). Krome, li dissendis al la membroj de la Subkomisiono cirkuleron, en kiu li prezentas la ĝisnunajn eksperimentajn rezul-



Gestudentoj de Esperanto-Fako en la Universitato ELTE dum vizito al Eger, kie Esperanto estas instruata ĉe la Pedagogia Altlernejo. Tiaj vizitoj okazas regule ĉiujare.

tojn kaj detalan bibliografion pri la temo. Sekve de tiuj dokumentoj, la estraro de la Subkomisiono aranĝis kunsidon por pridiskuti la temon. Laŭ la propono de la subskribinto, estis invititaj kiel observantoj ankaŭ du membroj de la estraro de HEA. La referaĵo finiĝis per la sekvaj konkretaj proponoj:

1. Enkonduki Esperanton kiel propedeŭtikan lingvon en la 3an kaj 4an klasojn de la baza lernejo, kiel unuan fremdan lingvon;
2. Restarigi la oficialan fakan instruadon de Esperanto en la pedagogiaj altlernejoj en Esztergom, Sárospatak kaj Szombathely;
3. Ebligi la tujan komencon de eksperimenta instruado en minimume dek lernejoj, por havi eblon prui la hipotezojn;
4. Esperanto estu instruebla oficiale, laŭprograme, en tiuj mezlernejoj, kie disponeblas diplomitaj mezlernejaj instruistoj pri Esperanto;
5. Oni enkonduku Esperanton en tiujn faklernejojn, kie nuntempe ne okazas instruado de kiu ajn fremda lingvo (metilernejoj, lernejoj por tajpado kaj stenografio, 2-jaraj sanitaraj lernejoj k.s.).

La protokolo de la kunsido jene resumas la debaton: *En la diskuto pri la temo de lernejoj eksperimentoj pri Esperanto, prezentita de István Szerdahelyi, krom la du invititaj HEA-reprezentantoj, parolis 9 membroj de la Subkomisiono. Esperanto rajtas havi sian lokon en ĉiuj projektoj pri la evoluigo de elekteblaj lingvoj. Oni ne decidis pri tio, kiun apogon ricevu Esperanto kiel eksperimenta lingvo antaŭ la 3a klaso aŭ en la superaj klasoj de la bazlernejo. La Laborkomisiono enkadrigas en sian sciencan esplorprogramon la kolekton de spertoj pri la instruado de Esperanto.*

Dum la sama kunsido estis fondita Redakta Komisiono por finpretigi la definitivajn proponojn. Laŭ tiu propono, la estonta skemo de la fremdlingva instruado en la lerneja sistemo aspektos jene:

Statuto

La Statuta Komisiono dankas la multajn membrojn de UEA, kiuj kontribuis ofte detalajn, pensigajn kaj utilajn komentariojn pri la proponoj aperigitaj en la decembra numero de la revuo. Ne eblas respondi al ili individue, sed la Komisiono konsideros ĉion zorge kaj mencias la ĉefajn punktojn en sia resumo pri la ĝisnunaj diskutoj, baldaŭ aperonta en la revuo. La Komisiono volonte ricevos pliajn komentariojn, kvankam ili nun verŝajne maltrafus la menciitan resumon. Leterojn oni adresu al la Komisiono, ĉe la CO de UEA en Roterdamo, prefere en kvar ekzempleroj. Ni atentigas, ke en la teksto aperigita en decembro mankis, pro teknika eraro, tri steletoj — ĉe la paragrafoj 6, 13 kaj 15.

Lingvoj/Klasoj	Baza lernejo					Mezlernejo (Gimnazio)			
	4a	5a	6a	7a	8a	1a	2a	3a	4a
la rusa	2	3	3	3	3	4	3	3	2
2a lingvo	-	-	3	5	5	2	2	-	-
3a lingvo	-	-	-	-	-	-	-	2	3

Laŭ la propono en la bazaj lernejoj la dua lingvo povas esti nur unu el la sekvaj tri lingvoj: A, F, G. En la mezlernejoj, krom la supraj, dua lingvo povas esti ankaŭ H, I, L. La tria lingvo povas esti: Esperanto kaj la klasika greka, krome, laŭ regionoj, la ĉeĥa, slovaka, pola, rumana, bulgara kaj serbokroata. El tiu propono poste sekvis la ministeria decido n-ro 22.011/1978, en kiu Esperanto rolas en la unua loko inter la lingvoj elekteblaj kiel tria fremda lingvo.

Ĉar la antaŭreformaj eksperimentoj komenciĝas tuj, la subskribinto devis dum rekorda tempo, ĝis la 15a de novembro 1978, prilabori la oficialan programon de la nova studobjekto, kaj ĝis la fino de decembro la unuan oficialan lernolibron por la 3a klaso de gimnazio. Ambaŭ dokumentoj estas jam pretaj.

Ekestas nun la demando: Kiel taksi tiun ĉi atingon?

Ni nepre ne supertaksu ĝin, sed ankaŭ ne subtaksu. La signifo estas ĉefe kvalita, kaj nur parte kvanta. Esperanto definitive eniris en la klubon de tiuj lingvoj, kiuj estas oficiale-fakultative — sed post la elekto devige — instrueblaj en la mezlernejoj. El tio sekvas, ke altiĝis la praktika valoro de la universitata diplomo, malfermiĝis la ebleco pluevoluigi tiun universitatan institucion.

Esperanto havas siajn oficialajn dokumentojn en la arkivo de la Ministerio kaj en la ŝranko de ĉiu mezlerneja direktoro. Esperanto havos siajn oficiale kaj ŝtate eldonitajn lernolibrojn, kiuj aperos sub la samaj kondiĉoj, en la sama formo, kiel la lernolibroj por la aliaj fremdaj lingvoj. Pretiĝos diversaj instruhelpiloj (magnetofonaj bendoj, lumbildoj, filmoj k.s.), kiuj povus iom post-iom kontribui al la nivelaltigo de la instrumentado; kolektiĝos spertoj pli konkretaj ol ĝis nun, ktp., ktp.

En la hungaraj mezlernejoj Esperanto per tio oficialiĝis. Ĝia statuso estas pli modesta ol la statuso de kelkaj aliaj lingvoj, sed gravas, ke tiu statuso ekzistas. Pri ĝia estonta realigo kaj ebla pluevoluigo respondecos la Esperantaj pedagogoj.

István Szerdahelyi

Informoj de CED

Konferenco en Budapeŝto

Fine de julio 1978 en Budapeŝto okazis grava konferenco, pri kiu ni nur lastatempe ricevis iom pli da informoj. Pro la graveco de tiu scienca kunveno ni dediĉas nun al ĝi spacon, malgraŭ la duonjara malfruo.

LA UNUA Internacia Interlingvistika Konferenco okazis inter la 24a kaj 28a de julio en la Universitato de Budapeŝto. Ĝin organizis la Katedro por Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko en tiu universitato, kunlabore kun la samnoma katedro de la Universitato de Venecio (Italio). La Konferenco, unu el malmultaj tiaspecaj ĝis nun, arigis kvindek da lingvistoj el Ĉeĥoslovakio, FR Germanio, Germana DR, Hungario, Israelo, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Svedio kaj Usono. Plejmultis sciencistoj el la du organizintaj universitatoj. Proksimume 30 referaĵoj traktis precipe interlingvistikajn kaj esperantologiajn temojn, sed ankaŭ sociolingvistikajn.

Krom la enkonduka prelego de la estro de la katedro, prof. d-ro János Balász (lingvistiko, interlingvistiko, esperantologio) pli malpli rekte interlingvistikon koncernis jenaj prelegoj: La nuntempa stato de la universitata instruado de interlingvistiko kaj esperantologio en

Budapest (I. Szerdahelyi); La uzado de matematiko en lingvistiko (C. Minnaja, Italio); Komparo de etno- kaj plan-lingvo (D. Blanke, GDR); La lingvoprojekto "Loglan" (J. Balbin, Usono); Determino kun kaj sen artikolo en Esperanto (F. Pennacchietti, Italio); Problemoj de tradukado (Gyula Ferenczy, Hungario); Verba aspekto en Esperanto (B. Wacha, Hungario); Bazaj ecoj de la lingvopolitiko (J. Pool, Usono); Etnologio kaj interlingvistiko (J. Jermař, Ĉeĥoslovakio); Sistemo de la internacia lingvouzo (A. Rátkai, Hungario); Nacia ŝtato kaj internacia lingvo (P. Zlatnar, Jugoslavio); Prob-



Dekano de la Filologia Fakultato en la Universitato ELTE, I. Szatmári, malfermas la Konferencon; maldekstre estas prof. Szerdahelyi kaj E. Barát; dekstre prof. J. Balázs.

letoj de interlingvistiko kaj minoritata lingvistiko en Soveta Unio (P. Bragaglia, Italio); Interlingva projekto de Komenio (V. Barandovská, Ĉeĥoslovakio); La socia bazo kaj komunikiva efikeco de interlingvoj (H. Trauttmüller, Svedio); Kriterioj por lingvotaksado en interlingvistiko (O. Reiersøl, Norvegio); Pliriĉigo de la mor-

femaro en planlingvo (R. Corsetti/M. la Torre/N. Vessella, Italio); Vortelekto en dulingvaj vortaroj (M. Šaturová, Ĉeĥoslovakio); La internacia vortaro kaj ĝia signifo por la dezirinda formo de planlingvo (W.A. Verloren van Themaat, Nederlando); Bibliografio pri eblaj planlingvaj fontoj en Esperanto (B. Golden, Hungario); Pri la ebla jidlingva kaj hebrea influo je Esperanto (D.C. Gold, Israelo).

Estas planite organizi en 1979 aŭ 1980 la 2an Internacian Interlingvistikan Konferencon en difinota lando.

La prelegoj aperos libroforme. La partoprenintoj ankaŭ diskutis pri la eblecoj iniciati la fondon de internacia interlingvistika asocio kunordigonta la fakajn aktivecojn. Menciindas la alta aprezo, kiun donis lingvistoj de la budapeŝta universitato al la konferenco kaj al la agado de la Esperanta fako, kiun pli ol 10 jarojn gvidas tie d-ro I. Szerdahelyi. La konferencon, kiu uzis krom Esperanto ankaŭ la lingvojn italan, anglan kaj hungaran, ĉeestis i.a. la ĉefredaktoro de la grava internacia tradukscienca revuo *Babel*.

D. B.

INICIATOJ:

Sonrevuo ekas

ANTAŬ DU JAROJ (*Esperanto*, majo 1977, p.86) la Estraro de UEA diskutis pri eblecoj ekeldoni sonan gazeton, kiu interalie povus pozitive influ la ĝeneralan lingvouzon en la Esperanto-movado. Intertempe okazis intensaj sondoj ĉe pluraj potencialaj kompetentuloj en diversaj landoj. Pri la demando okupiĝis precipe s-ino Anna Brennan, antaŭe volontulo, nun oficisto de UEA. Tiuj klopodoj ankoraŭ ne kondukis al plena realigo de la estrara iniciato. Tamen, aperis io, kion ni povus nomi provnumero de estonta sona revuo. Jen tiurilataj detaloj:

Fine de decembro 1978, sub gvido de la bone konata aktivulo Marinko Gjivoje, en Zagrebo (Jugoslavio) aperis 90-minuta kaseto kun interesa kaj varia enhavo. Fakte, ne temas pri tute nova entrepreno, sed pri intensigo de la antaŭe ekzistinta klopodo de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj produkti sonrevuon por siaj membroj kaj amikoj. Nun oni en Zagrebo celas pli-malpli regule eldonadi tiajn kasetojn. La regu-

leco dependos de la nombro de kunlaborantoj kaj de la intereso, kiun la sonrevuo vekos en la Movado. Kunlaboremuloj povas anonci sin al: s-ro M. Gjivoje, P.p. 5025, YU-41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavio.

La provnumero konsistas el deko da kontribuaĵoj: interparolo kun ĉina ĵurnalisto-esperantisto, eseo pri la hispana poeto kaj pentristo Rafael Alberti, intervjuo kun s-ino Emilija Lapenna, artikolo pri la stranga besto "dahuo", humuraĵo k.a. La sono estas tre profesie registrita kaj la parolantoj konservas multon el tiu ofte menciata bona jugoslava prononco de Esperanto. Kiel provnumeroj de ĉio, la kaseto ja havas mankojn, sed ili ne estas tiaj, ke ne valorus konatiĝi kun ĉi tiu serioza provo plenigi la vakuon, kiu ĉe multaj esperantistoj daŭras de unu internacia kongreso ĝis la alia. La provnumeron de la sona revuo eblas aĉeti ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, kontraŭ 10,50 (por Nederlando 12,39) gld., plus sendokostoj 10% (sed minimume 3,00 gld., se oni mendas nur la kaseton). Oni povas mendi ĝin ankaŭ ĉe la Magnetofona Servo de UEA, R.R.1, Bailieboro, Ontario, Kanado K0L 1B0, kaj ĉe Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

LANDA AGADO:

Gastoj en Malto

MEZMARA STELO estas la nomo de la nova dulingva (Esperanto kaj la malta) bulteno, eldonata de Malta Esperanto-Societo, ekde la pasinta jaro aliĝinta landa asocio de UEA. La numero 1 (januaro - marto 1979) estas 20-paĝa, varia, bone redaktita de f-ino Edwige Cassar. Por ni, la plej interesa novaĵo en la bulteno estis informo pri vizito okazinta fine de novembro kaj komence de decembro pasintjare. Tiam al Malto venis s-roj Franjo Vokoun kaj Nikola Rašić, vicprezidanto kaj sekretario de Kroata Esperanto-Ligo el Jugoslavio. La ĉefa temo de iliaj interparoloj kun ges-roj John Vella-Bondin, Anthony Mercieca, Emma Meli kaj Oscar Mifsud, funkciuloj de Malta Esperanto-Societo, estis kunlaboro inter la du organizaĵoj. Estis decidite i.a. apogi korespondajn kontaktojn kaj reciprokajn vizitojn inter la esperantistoj de Malto kaj Kroatio; en decembro 1979, la tradicia

aranĝo en Zagreb, ĉefurbo de Kroatio — "Semajno de unu kulturo" — estos dediĉita al Malto; helpi al maltanoj spertiĝi pri la Esperanto-instruado pere de partopreno en pedagogiaj aranĝoj, kiuj okazas ĉiujare en Kroatio. En la sama bulteno oni trovas informon pri la iom pli frue okazinta vizito al Malto de ges-roj Lindblom el Svedio (s-ro Lindblom estas prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio).

Ĉu necesas diri, ke la kontaktoj inter fortaj landaj movadoj, kiel tiuj en Jugoslavio kaj Svedio, kun la novaj landaj asocioj estas esence gravaj ĝenerale por la internacia Esperanto-movado. Svedoj jam pli frue helpis al Malto per aperigo de informa broŝuro pri Esperanto. Certe ankaŭ la novaj kontaktoj kun Jugoslavio povas havi nur pozitivajn efikojn. Kiu landa asocio starigos kunlaboron kun aliaj novaj Esperanto-organizaĵoj en Bolivio, Ĉilio, Ekvadoro, Hinda Unio, Kolombio, Kostariko, Meksikio, Pakistano, Peruo, Rumanujo, Zairio? Ne nur landaj asocioj sed ankaŭ fortaj lokaj grupoj povus helpi. Petu adresojn de la Centra Oficejo de UEA.

Bezono de edukado al tutmondeco

Plioftiĝas lastatempe en nia revuo pagitaj anoncoj, kiuj volas atentigi pri la sakstrato en kiu troviĝas la mondo, varbi por tera federigo kaj tutmonda demokratio, alarmi pri danĝeroj de la scienca evoluo, verkii pro la malpuriĝo de la homa medio. Unu el tiaj anoncoj aperas ankaŭ sur la lasta kovrila paĝo de ĉi tiu revunumero. Oni, t.e. ni kaj vi, arogas al si la rajton opinii, ke tiuj anoncoj estas strangaj, ke la anoncoj estas eksmodaj, anakronismaj, donkilihotaj en siaj persistaj klopodoj revoki la homecon al la homa vivo. Aliflanke, ni en la Movado ofte ne komprenas aŭ emas forgesi, ke la lingva problemo estas nur unu el la problemoj kaj faktoroj en la mondo ege rapide ŝanĝiĝanta. Jen teksto ekstreme instrua tiurilate. Ĝi devus helpi kompreni la mondon en kiu ni vivas. Ĝi devus ankaŭ vekti aŭ akceli nian pretecon adapti la Movadon al la mondo en kiu ĝi ekzistas kaj agas.

POR PRETIGI NIAJN INFANOJN bone por interdependa mondo, ni devas, inter la agitadoj kaj ĉeftraĵoj de la hodiaŭo, distingi tiujn emojn kaj tendencojn, kiuj estas fundamentaj al nia epoko, kaj flankenŝovi ĉion, kio estas hazarda, duaranga, efemera kaj anakronisma.


Plej trafa lastatempa konstato estas tio, ke de post la Dua Mondmilito, la homaro eniris tute novan epokon de la historio, eble eĉ de la evoluo. Dum tiu periodo, la homo spektakle antaŭeniris en la senfinan grandon kaj la senfinan malgrandon. Oni atingis pli grandan sciencan progreson en la pasintaj tridek jaroj ol dum la tuta antaŭa historio de la homaro. Oni sendis instrumentojn, lititajn per tuja komunikado al nia planedo, pli kaj pli foren en la universo. Homoj metis siajn piedojn sur la lunon, kaj revenis sekure al la tero. Oni

utiligas la eksteran spacon por senprecedentaj sistemoj de tutmonda komunikado kaj por studado de la fizikaj rimedoj kaj kondiĉoj de la tero. Pli ol mil satelitoj kaj spacobjektoj orbitas la teron. Transportado plivastiĝis de tero kaj maro al la atmosfero, per ĉiam pli grandaj kaj pli rapidaj aviadiloj. Per siaj iloj la homo atingis la abismon de la maroj. Ni atestis la jungadon de la atoma energio, la naskiĝon de la elektroniko, de kibernetiko, de lasera teknologio kaj malŝloso de multaj misteroj de la senfina malgrando. Mikrobiologio malfermis novajn vigligajn kaj timigajn perspektivojn de scienca antaŭeniĝo per la sintezado de genoj.

Neniam antaŭe sur tiu ĉi planedo okazis tiel intensaj esplorado kaj eltrovado, kiuj okupas tiel multajn klerajn homojn kaj instituciojn en tiel multaj landoj.

La industria revolucio kaj ĝiaj lastatempaj sciencaj kaj teknologiaj akceloj rezultigis profundajn konsekvencojn por la homaro. La unua efiko estis senprecedenta pliboniĝo de la vivkondiĉoj de la homaro sur tiu ĉi planedo. Tiu pliboniĝo disvastiĝas iom post iom tra la tuta mondo malgraŭ bedaŭrindaj malegalecoj kaj prokrastoj.

La longeco de la vivo prigrandiĝis, atingante pli ol sepdek jarojn en multaj riĉaj socioj. Eĉ en Hinda Unio, la vivdaŭra prognozo kreskis de 40 ĝis 50 jaroj interne de du jardekoj. Grandaj epidemioj, kiuj plagis la homaron antaŭnelonge, estas nun eliminitaj. Multaj malsanoj malprogresas. Oni faras gigantajn klopodojn por ataki la restantajn ĉefajn kaŭzojn de frua morto. Tiel la mortoritmado de la homoj reduktiĝis de 17 en mil en la jaroj 1950-1955 al 12,8 en mil, en 1970-1975. Estas bezonate, ke la mondo nutru aldonan milionon da homoj ĉiusemajne. Estas multe pli da kleraj homoj hodiaŭ ol vivis antaŭ dudek jaroj: de 1950 ĝis 1970, 625 milionoj da novalvenintoj aldoniĝis al la alfabeto enloĝantaro de la mondo, kiu nun atingas sumon de mil kvincent milionoj da homoj. La varoj disponigitaj al la homo por lia prizorgo kaj plezurigo atingis nekredeblajn kvantojn en kelkaj socioj. Ekzemple, por vivteni personon en Usono tra la meza vivodaŭro, estas bezonataj 211 milionoj da litroj da akvo, 140 mil litroj da benzino, 5,5 tunoj da viando, 5,5 tunoj da



Veter-satelito: Dum la lastaj jardekoj la scienco evoluis pli rapide ol dum la tuta antaŭa historio de la homaro.

tritiko, kaj 9 tunoj da lakto kaj kremo. En la pli malriĉaj partoj de la mondo, la nivelo de konsumado estas nur frakcio de tiuj ciferoj. Sed ankaŭ tie la kvanto de varoj je la dispono de la individuo daŭre kreskas. La scienca kaj teknika revolucio, kiu komenciĝis antaŭ 200 jaroj, etendiĝis al preskaŭ la tuto de la kontinentoj kaj ĝi konkeros, en la ne tro fora estonteco, nian tutan planedon.


La dua efiko estas la alveno de tute nova periodo en la monda historio, nome la epoko de amasaj fenomenoj pro la multobliĝo de homaj vivoj. Pli malaltaj mortoritmaj, pli longaj vivprognozoj, kaj pli bonaj vivkondiĉoj rezultigis la konatan pli rapidan kreskon de la homa specio.

La nombro de homoj sur nia planedo kreskis de 2,5 miliardoj da homoj en 1951, kiam Unuiĝintaj Nacioj publikigis la unuajn tutmondajn statistikojn ie! kredeblajn, al 4 miliardoj hodiaŭ. Estos pli ol 6 miliardoj en la jaro 2000, kaj infano hodiaŭ naskiĝanta plej verŝajne vivos en mondo de 12 miliardoj, kiam ĝi atingos la aĝon de 60 jaroj. Estas kvazaŭ tiu infano vidus la alteriĝon de pluraj miloj da milionoj da aldonaj homoj sur la planedon dum sia vivodaŭro.

La statistiko publikigita de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties instancoj montras duobligon aŭ triobligon de la plej multaj mondaj agregatoj dum la pasintaj dudek jaroj. La monda industria produktado triobligiĝis de 1950 ĝis 1970. La kvanto de mondaj eksportoj kvarobligiĝis. Agrikultura produktado pligrandiĝisoble 1,7. La fenomenaj kresko en la produktado de certaj varoj estas ilustrebla per la benzina fabrikado, kiu plialtiĝis kvinoble, plastajoj, kiuj plimultiĝis 15-oble, aluminio 5-oble, betono 4-oble, kruda ŝtalooble 2,8, aŭtomobilojoble 2,7. En 1923 ekzistis nur 11 urboj kun pli ol unu miliono da loĝantoj; hodiaŭ estas 160, kaj oni kalkulas, ke estos 300 en la jaro 2000.

Dum la kresko de la loĝantaro estas la plej granda en pli malriĉaj landoj, kaj la konsuma eksplodo estas la plej granda en evoluintaj regionoj, la industria revolucio daŭrigos sian nehaltigeblan progreson kaj disvastiĝon. Pli altaj statistikaĵoj pri la loĝantaro tiam multiplikiĝos kun ĉie pli alta konsumado, donante konsternajn sumojn. Jen la nova mondo, kiun ni eniris. Tio estas la veraj kaŭzoj de la diversaj krizoj, kiuj okupis la atenton de la homoj lastatempe: premoj je la homa medio, je rimedoj, la krizo de energio, la krizo de nutraĵoj, la urba krizo.

La tria efiko estas la alveno de komplika kaj ekstreme densa reto de tutmondaj interdependecoj inter socioj, kiuj ĝis antaŭnelonge vivadis en relativa reciproka izoliĝo. Aldone al la naturaj interdependoj, kiuj ĉiam karakterizis nian planedon (la akva ciklo, la oksigena ciklo, la nitrogena ciklo kaj multaj aliaj internaj ligoj de la biosfero), la mondo subite kaptiĝis en rapide kreskanta teksaĵo de home kreitaj interdependoj. Miloj da aviadiloj estas konstante en la aero, kaj ĉe certaj flughavenoj ili devas atendi en vicoj la malfermiĝon de aerkanalo aŭ alteriĝa vojo. Miloj da ŝipoj kaj vagonaroj portadas enormajn kvantojn da varoj de unu



Roterdamo, la plej granda haveno de la mondo: Miloj da ŝipoj alportas kaj forportas milionojn da vartunoj; ili venas de ĉiuj maroj de la mondo, ili direktiĝas al ĉiuj anguloj de la terglobo.

lando al alia. Marhavenoj postkuras la kreskon de la monda komerco, kaj ŝipoj devas enviciĝi en multaj el ili. Internaciaj turismo, kongresoj, kunvenoj, interhelpo kaj studoj balone ŝvelas. Kolosaj plurnaciaj kompanioj tenas niĉon en multaj landoj. Ili kombinas monon, laboristojn, rimedojn, kaj teknologion transnaciaj limoj je tutmonda skalo, kaj konsideras la terglobon unu merkato. Ili komencas esti pli grandaj ol multaj nacioj, tiel malfermante ankoraŭ novan paĝon en la historio de la potenco.

Tiuj interdependoj puŝis registarojn en novan kolektivan pensadon kaj kunlaborajn aranĝojn, kiuj estus nekoncepteblaj antaŭ kelkaj jardekoj. Sekve, Unuiĝintaj Nacioj profunde ŝanĝiĝis. Tiu organizaĵo, plifortigite de 16 specialigitaj instancoj kaj 14 specialaj programoj, hodiaŭ ligiĝas al preskaŭ ĉiu tutmonda problemo. En la pasintaj kelkaj jaroj okazis pluraj resonaj mondaj konferencoj, organizitaj de UN: pri la ekstera spaco, homa medio, loĝantaro, maroj kaj oceanoj, nutraĵo, dungado, homaj loĝejoj. Du pliaj

***Se vi ankoraŭ NE
pagis vian abonojn
por 1979, vi riskas ne
ricevi la aprilan nu-
meron de la revuo!?***

mondaj konferencoj nun aldoniĝas: pri monda akvo kaj pri dezertiĝo. Oni antaŭvidas poste konferencojn pri scienco kaj teknologio, monda turismo, klimataj ŝanĝoj. Tra sia tutmonda kolektado de informoj, siaj studoj kaj kunvenoj — politikaj, ekonomikaj, sociaj, sciencaj kaj kulturaj — Unuiĝintaj Nacioj fariĝis la plej granda observejo kaj averta sistemo de la planedo tero. Per internaciaj organizaĵoj, la registaroj honeste klopodas kunlabori en multaj fakoj, kvankam tia kunlaboro ofte meritis pli da konvinko, pli da energio, kaj pli da malavaro.

Sub tiel spektakle ŝanĝitaj cirkonstancoj, kiuj profunde efikas al niaj vivoj, ekzistas urĝa bezono de pli da edukado al tutmondeco. Tio estas tre grava por la estonteco de la homaro. Kial en siaj lernejoj niaj infanoj lernas tiel detale pri la pasinteco, geografio kaj administrado de la propra lando, kaj tiel malmulte pri la mondo, ĝiaj terglobaj problemoj, ĝiaj interdependoj, ĝia estonteco, kaj ĝiaj internaciaj institucioj? Homoj komplete surpriziĝas pri la subita apero de tutmondaj krizoj. Ili demandas sin kiel la degenero de la homa medio povus tiel evolui, ke ĝi atingu punkton kie la vivo mem estas en danĝero sur ĉi tiu planedo. Ili demandas sin kiel povus ekzisti energio-krizo, kiun ne antaŭvidis iliaj registaroj (sed kiun ja antaŭvidis Unuiĝintaj Nacioj, kiu kunvenigis jam en 1961 la unuan mondan konferencon pri novaj energifontoj). Ili scivolas, kiel malbonaj rikoltoj en foraj landoj povus subite altigi la prezojn de la nutraĵoj sur iliaj tabloj, kaj kial okazas neatendite monda nutraĵa manko, post tiel multaj jaroj da agrikultura troproduktado (tamen, pri tio avertis la mondon Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Nutrado kaj Agrikulturo). Infano naskita hodiaŭ frontos kiel plenkreskulo, preskaŭ ĉiutage, problemojn

proprajn al tutmonda interdependo, ĉu pri paco, nutraĵo, kvalito de la vivo, inflacio aŭ nesufiĉo de naturaj rimedoj. Ĝi estos rolanto kaj profitanto aŭ viktimo de la tuta monda tekso, kaj ĝi prave demandus: "Kial oni ne avertis min? Kial mi ne estis pli bone edukita? Kial miaj instruistoj ne informis min pri tiuj problemoj kaj klarigis mian konduton kiel membro de interdependa homa raso?" Temas, do, pri la devo kaj memprofitiga intereso de registaroj, ke ili bone eduksiajn infanojn pri la speco de mondo en kiu ili vivas. Ili devas informi la infanojn pri la agado, klopodoj kaj rekomendoj de la internaciaj organizaĵoj. Ili devas pretigi ilin por transpreni respondecon pri la konsekvencoj de siaj agoj, kaj helpi en la prizorgo de pluraj miloj da aldonaj milionoj da homoj sur la tero. Multaj registaroj komencas kompreni tion. En 1974 ili kreis Universitaton de Unuiĝintaj Nacioj, kun sidejo en Tokio kaj aliĝintoj en multaj nacioj. Institutoj por edukado al tutmondeco aperis, kaj UN kaj Unesko kunvenigas edukistojn por evoluigi tutmondecajn studprogramojn. En multaj landoj, precipe en Usono, edukistoj opinias, ke tio estas unu el la novaj direktoj de la edukado.

Unuiĝintaj Nacioj kaj ties instancoj havas grandan kvanton da informoj kaj scioj pri ĉiu imagebla monda problemo. Edukistoj devus sisteme spili tiun fonton. La tempo forkuras. Tutmondaj eventoj rapide moviĝas. Estus pli profitige instrui infanojn tra la mondo, ke ili fermu akvajn kranojn kelkajn sekundojn pli frue, kaj ke ili konservu niajn rimedojn, ol atendi solvojn tra la akcepto de komplika leĝaro, aŭ supozi, ke ni ĉiam povas bori novajn subterajn truojn por akiri pli da akvo kaj aliaj rimedoj. La mondo troviĝas en malfacila situacio, kaj ĝi ne povos solvi siajn tutmondajn problemojn, se la civitanoj ne edukiĝas pri ili jam nun



Leciono: Estas pli racie instrui la infanojn kiel mastrumi la riĉaĵojn de la mondo, ol klopodi per leĝaj paragrafoj devigi la civitanojn atenti la elĉerpigantajn provizojn de la akvo, petrolo, mineraloj, oksigeno, greno, karbo, gaso, fiŝo, viando ktp.

kaj ekde la plej frua juneco. Jen nova defio, nova historia dimensio, kaj verviga celo por edukistoj ĉie en la mondo.

Preter la kirliĝo, dividiĝoj kaj perpleksoj de nia epoko, la homaro malrapide sed firme eltrovas la vojojn, limojn kaj novajn normojn de konduto, kiuj ampleksos ĉiujn rasojn, naciojn kaj ideologiojn. La granda defio por la nova generacio estos la formulado de tiu nova etiko. Ĝi rilatos ne nur al la materia sorto de la homoj, sed ankaŭ al ilia mensa kaj spirita vivo. La plenumiĝo de la tera destino de la homo, de lia feliĉo dum la mallonga vivodaŭro, grandparte dependos de lia kompreno de la tuta tekso de vivo kaj lia persona rolo kaj sinteno ene de ĝi. Kiam la antaŭa ĝenerala sekretario de UN, U Thant, mem instruisto, diskutis tiujn problemojn kun siaj amikoj kaj kolegoj, li ĉiam revenis al sia fundamenta kredo, ke edukado tenas la ŝlosilojn de la estonteco, kaj ke mensa plenumiĝo superas la materialan

**U Thant
(1909-1974):
La edukado
tenas
la ŝlosilojn
de la
estonteco.**



vivon, moralaj kvalitoj superas mensajn kvalitojn, kaj spirita plenumiĝo superas la mensan vivon. Mi deziras citi ĉi tie du rimarkojn, unu el malofta parolado pri pliaj religiaj kredoj, kiun li faris en Toronto en 1966, kaj la alian el lia adiaŭa parolado al la stabo de Unuiĝintaj Nacioj en decembro 1971:

La leĝo de amo kaj kompato al ĉiuj vivantaj estaĵoj estas ankaŭ doktrino, kiun ni estas eĉ tro pretaj servi per la simplaj paroloj. Tamen, por fariĝi realaĵo, ĝi bezonas procedon de edukado, veran mensan renesancon. Kiam ĝi jam fariĝis realaĵo, naciaj, samkiel internaciaj, problemoj ordiĝos en perspektivo kaj fariĝos pli facile solveblaj, militoj kaj konfliktoj ankaŭ fariĝos tiam aferoj de la pasinteco, ĉar militoj komenciĝas en la mensoj de homoj, kaj en tiuj mensoj amo kaj kompato estos jam konstruintaj la remparojn de la paco.

Mi havas certajn prioritatojn koncerne virtojn kaj homajn valorojn. Ideala viro aŭ ideala virino estas dotita de kvar kvalitoj, kvar karakterizoj – fizikaj kvalitoj, intelektaj kvalitoj, moralaj kvalitoj kaj spiritaj

kvalitoj. Kompreneble, estas tre malofte, ke oni trovu homon, kiu posedas ĉiujn tiujn kvalitojn, sed kiam temas pri prioritatoj, mi metus pli grandan gravecon je intelektaj kvalitoj ol je fizikaj kvalitoj. Mi metus ankorau pli grandan gravecon je moralaj kvalitoj kompare kun intelektaj kvalitoj. Ne estas mia celo malvalorigi intelektismon, sed mi metus pli grandan gravecon je moralaj kvalitoj aŭ moralaj virtoj kompare kun intelektaj kvalitoj aŭ intelektaj virtoj – moralaj kvalitoj kiel amo, kompato, kompreno, tolero, la filozofio de "vivi kaj lasi vivi", la eblo kompreni la vidpunkton de aliaj, kiuj estas la ŝlosilo de ĉiuj grandaj religioj. Kaj ĉefe mi donus plej grandan gravecon al spiritaj valoroj, spiritaj kvalitoj. Mi intence evitas la terminon "religio". Mi celas la spiritajn virtojn, memfidon, la purecon de la propra interna memo, kiu laŭ mi estas la plej granda virto el ĉio. Per tiu eliro, tiu filozofio, tiu koncepto sole, ni povos formi la specon de socio, kiun ni bezonas, la specon de socio, kiun antaŭvidis la fondintoj de Unuiĝintaj Nacioj antaŭ 26 jaroj.

Jes ja, edukado al tutmondeco devas superi materialajn kaj intelektajn atingojn, kaj etendiĝi ankaŭ en la moralajn kaj spiritajn sferojn. La homo sukcesis etendi la potencon de siaj manoj per nekredeblaj maŝinoj, de siaj okuloj per teleskopoj kaj mikroskopoj, de siaj oreloj per telefono, radiaj ondoj, kaj radaro, de sia cerbo per komputiloj kaj aŭtomatigo; li devas nun etendi sian koron, siajn sentimentojn, sian amon kaj sian animon al la dimensio de la tuta homa familio, kaj al nia tuta bela planedo, kiu cirklumas en la universo. Ni devas administri nian terglobojn por ebligi al la miloj da milionoj da homoj, allasitaj en la miraklon de la vivo, ke ili vivu kune en paco kaj harmonio en pli bonaj, pli pacaj, pli justaj kaj pli belaj kondiĉoj, plenumante siajn vivojn fizike, mense, morale kaj spirite, kiel neniam estis eble antaŭe en la tuta evoluo de la homaro. Edukado al tutmondeco devas pretigi niajn infanojn por la alveno de la interdependa, sekura, prospera, amika kaj feliĉa mondo. La vera, la granda periodo de homa plenumiĝo sur la planedo tero komenciĝas nur nun.

Robert Muller

NOTO: Robert Muller estas alzacano. Antaŭ pluraj jaroj li estis persona asistanto de U Thant, tiama ĝenerala sekretario de UN. Li nun estas funkciulo en la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, do en tiu parto de UN pere de kiu i.a. la neregistaraj organizaĵoj (ankaŭ UEA) estas ligitaj al Unuiĝintaj Nacioj. Ĉi tiu teksto, verkita antaŭ du jaroj laŭ peto de World Affairs Council of Philadelphia (Filadelfia Konsilio pri Mondaj Aferoj), fariĝis intertempe unu el la ĉefaj agad-dokumentoj de alia organizaĵo en tiu usona grandurbo – Global Interdependence Center, kie d-ro H. Tonkin estas vicprezidanto (li estas komitatano ankaŭ en la unue menciita filadelfia organizaĵo). Al tiu kunplektiĝo de la cirkonstancoj, al tiu "kaŝita vivo" de la prezidanto de UEA, ni ŝuldas ĉi tiun tekston, kiu aperas en la traduko de d-ro Tonkin, kun afabla permeso de la aŭtoro.

Ĉu tio estas la fama Ady?

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

La morto de la ĉielarko; Elektitaj poemoj kaj artikoloj, Endre Ady (1877-1919). Red. Vilmos Benczik. El la hungara. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. 87p. 20cm. Bind. ISBN 963 571 028 1.

Referencaj libroj unuanimas pri la elstareco de la hungara poeto Emry Ady (1877-1919). Li "estas probable la plej granda hungara lirika poeto" (*Encyclopædia Britannica*), "la plej signifa figuro en la frua 20a-jarcento



La nevenkito:
Ady restas defio por la tradukantoj de lia poezio en la Internacian Lingvon.

la hungara literaturo" (*The Penguin Companion to Literature*), "neniam perdos sian gravecon" (*Guide to Modern World Literature*). Konsiderante la kompetentan prijuĝon, ke ekzemple la tri tradukaj eldonoj ekzistantaj en la angla lingvo de lia poezio estas "pli-malpli en tia 18a-jarcenta angla idiomo, kiu apenaŭ faras juston al la propra lingvo de Ady" (M. Seymour-Smith), oni ne povas ne senti ian neracian antaŭfieron prenante en la manon libreton kun elektitaj poemoj de tiu poeto en Esperanta traduko, plejparte fare de Kalocsay mem, lia samlandano kaj la plej laŭdita poeto en Esperanto. "Neracian" mi skribis, ĉar certe nek Esperanto nek la nomo de Kalocsay estas per si mem ia garantio de tio, ke la "diamanto" ne "forvaporigos" en la lingva transigo (por uzi komparan esprimon de la hungara verkisto István Örkény, cititan de Vilmos Benczik en la postparolo). Kaj nun mi staras antaŭ malfacila demando: Ĉu la koncerna prezento de Ady sukcesas transbriligi la diamanton? Aŭ ĉu estas pravigebla la timo de Benczik, esprimita postvorte, "ke tio, kio

en la originalo sonis potence, impete, en Esperanta vesto griziĝis kaj banaliĝis"?

La respondo ne povas esti simpla, kvankam necesas ĉi-kadre doni al ĝi simplan aspekton. Multaj el la tradukoj evidente estas bonaj verkaĵoj per si mem, ekzemple la arda amesprimo de "Konservi vin ..." (Pg. 9):

Jam frenezigas min ĉi bono,
ĉi granda, granda plenumiĝo,
kisa realo kaj sindono.
En via sin' sopire, plore,
mi vin petegas, sinjorin',
en nokton pelu min senkore ...

Mi ankaŭ volas kredi, ke ĉi tie oni povas rekte percepti la animon de la poeto en tiu momento, kaj lian arton sen kripliga artefaro. Sed bedaŭrinde okazas pli ofte, ke io forbaras ekeston de vere estetika sento. Post multa relegado kaj cerbumado mi atingis la konkludan juĝon, ke la ĝenerala kaŭzo de tio estas tro ŝarĝpeza stilo ĉe multaj el la tradukoj, siavice kaŭzita probable de la konata obsedo de Kalocsay imiti la originalajn versformojn. Formkulto ĉiam minacas lezi la poezian spiriton, eĉ en la manoj de konscienca vortartisto. Estas atendeble, ke la plej subtilaj lirikistoj malplej akceptas tian pritrakton, kaj mi timas, ke ĝuste tio nun okazis pri la poezio de Ady. Svarmaj elizioj kaj vortradikaj denskunmetoj emas kunpremi la stilon ĝis foje neeltenebla artefareco, kaj la sonbildo de la frazo ripete grincas. Kion diri ekzemple pri 40-foja ripeto de la versfinaĵo **-iĝas** en la sama poemo ("Kanto kronika el 1918", pg. 60)? La antaŭfinaĵaj radikrimoj neniel kontraŭbilancas tian perforton. Se tia rimedo celas redoni iun apartaĵon de la originalo, ĝi nepre malsukcesas, ĝi simple estas ridinda Esperanto.

Post tia sperto mi emas supozi, ke nur zorge dulingva prezento kun detalaj klarigoj kaj notoj povus fari kontentigan juston al tia liriko, kia de Ady. La klarigoj devus ne nur koncerni la temon kaj sencon de ĉiu prezentita poemo, sed ankaŭ la formon kaj la originalan sonar-konsiston. La traduko devus esti zorge laŭlinia, sed senversa kaj senrima. Arta tradukprovo povus sekvi, unu aŭ pluraj. Tian prezenton de Ady — kaj de pliaj netradukeblaj majstroj de la lirika vorto — mi dezirus vidi.

Mendu ĉe UEA: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

Amuze, satire, pensige...

Recenzas James F. Cool (Usono):

Vage tra la dimensioj de Gaku Konisi. Oosaka: Japania Esperanta Librokooperativo, 1976. 77p. 18cm.

Ses el ĉi tiuj sciencfikcietoj jam aperis aliloke, sed kolektite, ili reliefigas la multflankecon de la talenta kaj eltrovema aŭtoro. Oni ne povas diri, ke la sep rakontoj kunfandiĝas por vidigi ian unuforman vizion:

temas pri pluraj eblaj estontecoj. Diversas simile la tonoj de la unuopaj rakontoj. En kelkaj rakontoj ("La tradukmaŝino" kaj "La epoko de amaskonsumado") regas malpeza, humurplena satiro; en aliaj ("La subtera elizeo" kaj "La skandalo Prociono") la satiro fariĝas pli akra. En du fikciaĵoj pri eltera migrado, mankas kaj humuro kaj satiro.

La unueco de la kolekto aperas unue en la rakontarto: Konisi preferas la distre surprizan turniĝon ĉe la fino, kaj plejparte li brile sukcesas prepari ian logikan sed tamen neatenditan finon (esceptas nur la poezieca kaj stabileca "Kosmoŝipo 'Edeno n-ro 5'"). Pleje unuigas la kolekton la pesimisma vido pri la estonta homsocio. En ĉiuj rakontoj tekniko kaj maŝinoj kruele mastras kaj senhomigas la teranojn. Foje aperas eĉ ne unu individua homo. Eĉ la individuuloj portas literojn aŭ alegoriaĵojn (ekz. f-ino Beltali aŭ s-ro Stink) anstataŭ nomojn. Ankaŭ niaj posteuloj interbatalos pro gloramo, ambicio, monavido kaj potencemo, kaj la maloftaj simpatiuloj ĉiam terure fiaskos pro perfido fare de siaj kunuloj. Stereotipaj roluloj do, unue ĉar tiel la aŭtoro vizias la estontan homaron, sed ankaŭ ĉar ĝenerale en la scienca fikcio plejmulte interesas la tutsocia evoluo, kiun unuopaj roluloj nur ekzemplas.

Eble pli spertaj amatoroj de scienca fikcio preferus, ke la verkisto vagu iom pli disten tra pli foraj dimensioj. Liaj estontecoj radikas pez-plumpe en niaj nunaj soci-problemoj: senokupaj maljunuloj, troloĝateco, kaj amaskonsumado. Kial niaj genepoj ne havos siajn proprajn okupojn? Ĉe la ĝenerala leganto, tamen, Konisi plene atingas siajn celojn: li amuzas, satiras, foje ankaŭ pensigas.

Mendu ĉe UEA: 9,30 (por Nederlando 9,67) gld., plus sendokostoj 10%.

Defio al „Scienca revuo“

Recenzas Rob Vetter (Nederlando):

Sciencaj komunikaĵoj 1977. Redaktis O. Haszpra. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. 100p. Ilus. 23cm.

Sciencaj komunikaĵoj 1978. Redaktis O. Haszpra. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1978. 100p. Ilus. 23cm.

Kial ni eldonadas sciencajn periodaĵojn en Esperanto? Tio havas minimume 3 kialojn: 1) por servi al la klerigemuloj (abonu); 2) por krei eblecon de sineduko al verkantoj de sciencaj kontribuadoj, rilate al la terminologio kaj stilo (kunlaboru); 3) por konvinki la eksterulojn en universitataj medioj, ke Esperanto taŭgas por scienca komunikado (varbu).

De post 1975 aperadas la jarkolekto *Sciencaj komunikaĵoj* (kiel aldono al *Budapeŝta informilo*), sub la agema gvido de d-ro Otto Haszpra, kaj ĝi sukcese servas al la tri nomitaj celoj. La enhavo ampleksas riĉan ga-

mon da temoj: Fina Akto de Helsinki, nomografio, prahoma arto, estiĝo de tera vivo, Salmonelo-infektoj. La nivelo de la artikoloj pretendas esti inter popularscienca kaj scienca. Kaj efektive estas. Tio signifas, ke abiturienta klereco, kaj intereso pri iu temo, sufiĉas por kompreni artikolon. Per tio Haszpra demonstras, ke li ne bezonis la "Iranan lecionon" (v. *Esperanto*, januaro 1978). *Sciencaj komunikaĵoj* ne turnas sin al la fakspecialistoj kun originalaj esplor-raportoj, ĉar por tio ne ekzistas publiko. Kelkaj artikoloj, ĉefe pri inĝenieraj temoj, resumas klasikan studmaterialon kaj prezentas terminologian laboron.

Tre grava estas la tria celo: kreskigi la adeptaron kaj nombron de simpatiantoj por uzo de Esperanto en la sciencoj. Ankaŭ ĉi-rilate *Sciencaj komunikaĵoj* bone taŭgas, ĉar, kvankam modestformata, ĝi plaĉe kaj digne aspektas, kun deca dozo da formuloj kaj kun klaraj desegnoj kaj diagramoj. Bedaŭrinde, la guldena vendo-prezo impresas nepravigeble alta.

Mendu ĉe UEA: SK 1977 11,70; SK 1978 13,20 (por Nederlando 12,17 kaj 13,73) gld., plus sendokostoj 10%.

Suplemento al lingvistikaj teorioj

Recenzas Naokazu Kawasaki (Japanio):

Jes, Esperanto estas vera lingvo; Respondo al Spang-Hanssen, de István Szerdahelyi. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1976. 42p. 21cm.

Esperantologiaj kajeroj 1. Redaktis I. Szerdahelyi. Budapeŝto: ELTE/BTK, 1976. 239p. 24cm.

Vorto kaj vortelemento en Esperanto, de István Szerdahelyi. Kuopio: Literatura Foiro/KCE, 1976. 16p. 21cm.

En 1975 dana lingvisto Spang-Hanssen demandis: "Ĉu la internacia helplingvo estas lingvo?" Szerdahelyi respondas: jes. Li diras (p. 29): "Se oni serĉas historian ekzemplon, oni eble povus kompari la nunan, modernan funkciadon de Esperanto kun la funkciado de mez-latino en tiutempa Eŭropo. La latina jam ne plu havis etnan medion, ankaŭ la lingvo forte ŝanĝiĝis, kaj ĝi plenumis la rolon de neŭtrala interlingvo en la tuta Eŭropo."

Li prezentas la opiniojn de lingvistoj, kiuj estas por kaj kontraŭ interlingvo konstruita. Lia priskribo kompletigas la tabelon faritan de Wüster en "Universitataj profesoroj de lingvoscienco pri planlingvoj" (*Internationale Sprachnormung in der Technik*, 1931).

Waringhien demandas en *Literatura foiro* (citita en *Vorto kaj vortelemento*, p.5): "Se, kiel Szerdahelyi asertas, la morfemoj ne havas gramatikan karakteron, kiel oni povas klarigi, ke el la morfemoj **bros** kaj **bala** oni devenigas **broso** kaj **balailo**, kaj ne inverse?"

Waringhien ekiras de radiko al vorto, sed la ekirpunkto de Szerdahelyi estas alia. En "La Esperanta morfem-

aro (*Esperantologiaj Kajeroj 1*, p. 97-99), li skribas:
 "... Z prenis el la fontlingvoj **vortojn** kune kun ilia plena leksiko-gramatika signifo. El ili li ekstraktis la **radik-morfemon** — en kiu restis la semantika valoro, sed kiu perdis la gramatikan, kaj fariĝis morfemo, kun ĝenerala, potencia, hipoteza signifo ...

F brosse > BROSO > BROS-

A to comb > KOMBI > KOMB-

Sekve: la primaraj formoj...estas: BROSO, KOMBI, BELA — la sekundara...: BROS, KOMB, BEL. La primara formo "preskribas" ĉiujn sekvajn derivaĵojn: se BROSO signifas ilon, BROSI signifas agon pri tiu ilo kaj BROSADO — la substantivigitan agon. Se KOMBI signifas la agon per ilo, KOMBILO signifas la instrumenton, ĉar KOMBO — laŭ la internaj leĝoj de la sistemo, devos signifi la substantivigitan agon. La fakto, ke Z listigis ne la pretajn vortojn nur la morfemon, aldonante al ili signifon ne estas argumento, sed pure praktika procedo: li ĉiam subkomprenigis la adekvatan paragrafon al la Fundamenta Gramatiko, ekz. § 2: 'La substantivo havas -o finaĵon'."

Zamenhof, personkaraktere ne teoriema, ne formulis teorion pri derivado en la iniciato de Esperanto. Szerdahelyi argumentas kun 'ĝenerala lingvistika teorio'. La teorio, ke gramatika karaktero estas inherenta en radiko, akcentas, ke ĝi estas la karakterizaĵo de Esperanto. Eĉ se tia karakterizaĵo, kia estas en Esperanto, ne ekzistas en aliaj lingvoj, ĝi povas esti materialo suplementa al la ĝenerala lingvistika teorio.

Pri partikuloj kaj afiksoj la afero estas tre komplikita. En *Esperantologiaj kajeroj 1* ekzistas artikoloj de aliaj personoj. Ekz. pri difina artikolo, pri ci, pri prepozicio, pri verbo k.a. Mi admiras, ke ili diligente studas nian lingvon.

Mendu ĉe UEA: *Jes, Esperanto estas vera lingvo; Respondo al Spang-Hanssen:* 4,80 (por Nederlando 4,99) gld.; *Esperantologiaj kajeroj 1:* 14,70 (15,29) gld.; *Vorto kaj vortelemento en Esperanto:* 3,30 (3,43) gld., plus sendokostoj 10%.

Bonaj argumentoj

Recenzas Boris Kolker (Soveta Unio):

Esperanto sen antaŭjuĝoj. Walter Francini. Rio de Janeiro/São Paulo: Kultura Kooperativo de Esperantistoj/San Paŭla Esperanto-Asocio, 1978. 208p. 21cm. En sia parolado dum la 63a UK en Varna d-ro Tonkin atentigis, ke ni ne povos iun konvinki "per duonbaktaj argumentoj". Multfoje esperantistoj skribas kaj parolas pri bezono havi libron kun argumentoj kontraŭ diversaj antaŭjuĝoj. Kaj jen Walter Francini, respondante al "la sociala mendo", tian libron verkis kaj bele eldonigis.

En la unua parto la aŭtoro donas iom da informoj pri la lingvo kaj movado. En la dua parto estas traktataj ĝeneralaj demandoj: Esperanto havas literaturajn tradi-

ciojn; ĝi estas utiligebla kiel scienca lingvo; ĝi progresas, havas praktikan valoron, estas la plej taŭga el ĉiuj planlingvoj; ĝi ne disfalas en dialektojn; ĝi ligiĝas al neniuj popolo, ideologio aŭ religio k.s.

En la sekvaj partoj la aŭtoro konsideras antaŭjuĝojn, kiuj koncernas detalojn de la Esperantaj fonetiko, grafiko, morfologio, vortfarado, leksiko, semantiko.

Entute la aŭtoro bone argumentas, kaj lia libro estas varme rekomendinda — ne nur por komencantoj, sed ankaŭ por spertuloj. Sed multe pli ĝi utilis, se ĝi aperus en nacilingvaj tradukoj kun adapto al lokaj cirkonstancoj.*

El negativaj flankoj de la libro oni povus noti fojan longecon kaj nekoherecon de la teksto. Tamen konsentu, ke antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto plejofte estas tre neseriozaj, do estas vere malfacile rebati ilin serioze. La lingvaĵo ĝenerale estas bona, kvankam ne sen peketoj. La libro devus vekti intereson al siaspecaj klubaj kvizoj, kiam unu persono (aŭ teamo) estu defendanto de Esperanto, kaj aliaj prezentu por rebato ĉiajn eblajn kontraŭargumentojn. Tiaj kvizoj povus kombini agrablon kun utilo.

Mendu ĉe UEA: 12,90 (por Nederlando 13,42) gld., plus sendokostoj 10%.

* En 1976 aperis la portugala eldono: *Esperanto sem preconceitos*. Prezo: 5,10 gld.

Laste aperis...

Ĉu li bremsis sufiĉe? Johán Valano (ps., 1931 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 128p. 21cm. Belliteratura serio 39. ISBN 90 6336 008 8. Originala krimromano en kiu la murdon esploras polica detektivo Jano Kral, protagonisto de *Ĉu vi kuiras ĉine?*, unua romano de ĉi tiu aŭtoro. Prezo: 12,00 gld.

Danĝera ul', kantas Jak Lepuil'. El la franca trad. Georgo Lagrang'. Pizo: La Nuova Frontiera, 1978. Kaseto stereofona, 50-minuta. Kun tekstlibreto (71p., ilus. de Serĵ Sire', 21cm.). Dek unu protestkanzonoj modernaj. Prezo: 19,50 gld.

Disvolviĝo de interlingva ideo en moderna Japanujo, kaj aliaj artikoloj, La, Fujima-Cunetaro. Oosaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1978. 80p. 18cm. Kvar artikoloj japanlingvaj. Prezo: 4,80 gld.

Laŭta vekhorloĝo, La, Stefan MacGill (1948-). Groningen: Nederlanda Esperanto-Junularo, 1979. 32p. Ilus. de la aŭtoro. 20cm. Legolibro taŭga por uzo dum aŭ tuj post elementa kurso. Prezo: 3,60 gld.

Manuale pratico della lingua Esperanto. Verona: Unione Esperantisti Cattolici Italiani, 1977 (5a eld.). 126p. 17cm. Prezo: 6,00 gld.

Nederlando koncize. 's Gravenhage: Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, 1978. 48p. Ilus. 22cm. Nova eldono de informplena broŝuro, havebla kontraŭ 2 int. rpk. ĉe Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstr. 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando.

Nova butikisto de Nukugaia kaj aliaj noveloj, La, Bertram Potts (1895-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 250p. 21cm. Bel-literatura Eldon-serio 38. ISBN 90 6336 002 9. Dek tri leĝeraj, amuzaj noveloj. Prezo: 15,00 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

Danĝera starpunkto

La artikolo de S. Milojević (*Esperanto* de novembro 1978, p. 189) enhavas tendencon, kiun mi opinias danĝera por la strebado al vera humaneco, ĉar tiu teksto minacas malakceli nian laboron por pli justaj socioj. Ne ĝustas, ke "dum ni okupiĝos pri politikaj aspektoj de homaj rajtoj, neniuj faros nian parton de la homrajta laboro...". Ni devas kaj povas agadi sur ambaŭ kampoj.

John Karlsson, Svedio

Eŭropismo

En la dua kolumno de la paĝo 221 (*Esperanto*, decembro 1978) staras: "Tio estis la duan fojon, ke...". Ĉu tio ne devus esti la dua fojo? Malpli grave, ĉu ne devus esti kiam tie anstataŭ ke? La uzo de ke kun fojo impresas min kiel eŭropismo. En mia lingvo oni simple turnus la frazon alie: "Jen duafoje unu el la belgaj filioj...".

Probal Daşgupto, Nov-Jorko

Quarello

Vere estas honto, ke oni ne scias la ĝustan daton de la forpaso de Daniel Quarello (*Esperanto*, julio/aŭgusto 1978, p.145) kaj ke neniuj ĝenis sin sciigi pri tio. Li forpasis la 21an de novembro 1977 en Buenos Aires, kie li vivis ekde 1927.

Ergoto, Argentino

Krei la neceson je ni

Mi vidas en *Esperanto* (oktobro 1978) la reklamon pri la ebleco liveri senriproĉajn tekstojn, presitajn en kiu ajn lingvo, flanke de la Grafika Centro de UEA. Mi opinias, ke la reklamo de tiu ĉi valorega ebleco devas trafi ne nin, sed la propagandoficejojn de grandaj kaj malpli grandaj firmaoj, kiuj volas lanĉi iun sian produkton. Do, tia anonco devus aperi ne (aŭ almenaŭ ne nur) en Esperanta revuo, sed en neesperantistaj ĵurnaloj. Kiam mi, ekzemple, en Italujo ĝin vidos en *La Stampa* aŭ en *Corriere della sera*, tiam mi sentos, ke ni fine estas sur la ĝusta vojo. Ni devas oferti servojn al la neesperantistoj, krei la neceson je ni, persvadiĝi, ke ne ni bezonas la aliajn, sed la aliaj ege nin. Kaj, male, ni daŭre diskonigas niajn gigantajn eblecojn nur inter ni mem.

Clelia Conterno, Italio

Por komercista akurateco

Ofte oni aŭdas plendojn pri mankanta intereso por Esperantaj eldonaĵoj. Ankaŭ mi nun havas trijaran sperton kiel propra eldonisto kaj preferas silenti pri la vendociferoj. La kaŭzoj por tiuj malsukcesoj estas multaj. Plejparte ili kuŝas en niaj propraj vicoj kaj fontas el malbona organizo. Ni devas aktivigi niajn surpapere ekzistantajn libroservojn kaj enŝalti profesiajn librovendistojn,

por apliki en niaj agadoj komercistan akuratecon. Ofte okazas, ke eĉ oficialaj instancoj ne respondas al seriozaj leteroj. La landaj asocioj devus kontroli la funkciadon de enlandaj servoj, kaj UEA devus kolekti la informojn kaj konsili pri pli bona agado. **Josef E. Hartl, Aŭstrio**

Diferenco eksterkunsida

Por plue trakti vian temon pri lingvo kaj la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (*Esperanto*, novembro 1978), tre menciinda estas alia granda diferenco inter la Universala Kongreso kaj la funkciado de, ekzemple, UN kaj Eŭropa Parlamento. La plej granda diferenco ne estas en la oficialaj kunvenoj, kie la sistemo de tradukado ja funkcias, eĉ se ĝi estas neniel perfekta, sed ĝi montriĝas ekster la oficialaj kunsidoj, en la vestibloj, restoracioj kaj salonoj, kie ne funkcias tradukservoj kaj delegitoj ne povas interparoli.

J.A. Briscoe, Britio

Resumoj pri sciencaj artikoloj

La atentigo fare de Richard Wood (*Esperanto*, januaro 1979, p.7), ke lingvistikaj artikoloj pri Esperanto ĝenerale ne eniras la ĉefan bibliografian informservon pri lingvistiko interesas min, ĉar mi dum longa tempo suspektis ke multaj artikoloj pri la fizikaj sciencoj verkitaj en Esperanto perdiĝas al la monda komunumo de sciencistoj pro simila kaŭzo. Unu maniero solvi tiun problemon estus starigo de informcentro, kie oni sisteme kolektus sciencajn artikolojn en aŭ pri Esperanto, por ke oni tuj sendu ilin al la ĝustaj bibliografiaj servoj. Tamen intertempe la redaktoroj kaj aŭtoroj devus mem prizorgi tion.

Mi estas redaktoro de resum-gazeto, kiu entenas detalojn de artikoloj pri industria aerodinamiko, kaj mi prilaboras ankaŭ novan komputeran informbankon, kiu enhavos milojn da artikolresumoj pri fluid-inĝenierado ĝenerale. Oni povus diri, ke la sola kialo ke mi ne profesie okupiĝas pri Esperanta literaturo estas nericevo de artikoloj en la Internacia Lingvo. Tamen sendube kelkaj tiaj artikoloj ekzistas. Do, se iu leganto havas detalojn pri scienca aŭ teknika artikolo pri fluoj (ekzemple pri vento, hidraŭliko, tribo-metrio...), li bonvolu sendi al mi plenajn detalojn ĉe: 140 Brookfield Road, Bedford, Britio.

Ian Fantom, Britio

Kial mankas okcidentanoj?

Mi ne havis la eblecon kongresi en Varno pro fakaj okupoj, sed anstataŭ tio mi partoprenis Esperanto-kurson en Bydgoszcz, Pollando. Surprizas min, ke la polaj Esperanto-aranĝoj ne estas frekventataj de okcidenteŭropanoj. Mi jam dufoje feris en Pollando kaj partoprenis tri Esperanto-aranĝojn tie. Al mi ŝajnas, ke tie estas favoraj kondiĉoj por diversnaciaj esperantistoj, t.e. bonaj gvidantoj, ege malaltaj kostoj kaj afablaj gastigantoj. Sed vere, internacia atmosfero postulas plurnacian partoprenantaron.

Jón Hafstein Jónsson, Islando

Kien iri dum duona jaro?

Marto

- 09-11 Internacia Foira E-Renkontiĝo, Leipzig, GDR (Kulturbund, IFER, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-701 Leipzig)
- 17-18 58a Kongreso de FLE, Lage Vuursche, Nederlando (Bond v. Arb. Esperantisten, Dirkslandhof 18, 3086 CC Rotterdam)
- 17-24 Internacia Fervojista E-Skisemajno, Maria Alm, Aŭstrio (IFEF, Wiener Str. 121, D-6000 Frankfurt/Main 70)
- 31 Limdato de la Belartaj Konkursoj
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Aprilo

- 01-07 Gajaj E-Tagoj, Sofia, Bulgario (Monda Turismo, Pf. 45, BG-1090 Sofia)
- 06-08 Nederlanda Esperanto-Kongreso, Apeldoorn, Nederlando (Esperanto-Centrum, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag)
- 07-09 Junulara E-Renkonto, Hódmezővásárhely, Hungario (HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 11-18 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 12-15 39a Argentina Kongreso de Esperanto (Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, Rosario)
- 12-16 3a Internacia Junulara Festivalo, Marina di Massa, Italio (IEJ, C.P. 210, I-56100 Pisa)
- 12-18 Internacia Renkontiĝo por infanoj, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo, vd. supre)
- 13-16 63a Brita Kongreso de Esp., Cheltenham, Britio (W. Hawkins, 307 Stroud Road, Gloucester GL1 5LF)
- 13-18 Internacia Scienca Simpozio, Marília, Brazilo (Caixa Postal nº 556, BR-17500 Marília, SP)
- 14 Zamenhof mortis en 1917
- 14-16 34a Kongreso de SAT-Amikaro, Avignon, Francio (A. Gente, 9, av. des Erables, F-84000 Avignon)
- 22-25 Printempaj tagoj, Assisi, Italio (U.E.C.I., Viale C. Zavagli, 73, I-47037 Rimini)
- 25-28 7a Studenta Interlingvistika Seminario, Varsovio, Pollando (SZSP, Interlingwistyczne Koło Naukowe, ul. Krakowskie Przedmieście 24, PL 00-325 Warszawa)
- 27-29 Dana Jarkongreso, Aarhus, Danlando (I. Kensing, Assensgade 18, DK-8000 Aarhus C.)
- 27-01/5 61a Kongreso de BEF kaj 71a Kongreso de UFE, Lille, Francio (M. Vilhelm, 16, rue des Aubépines, F-59155 Faches-Thumesnil)
- 28-29 5a Internacia Terminara Konferenco, Bremen, FRG (Hartig, Kasseler Str. 76, D-28 Bremen 1)

- 28-01/5 Renkontiĝo de JEFO, Lille, Francio (Dawson, 22, rue Nattier, F-62000 Arras)
- 28-06/5 Esp. rondveturo en klasika Italio (A. Foa, via S. Maurilio, 7, I-20123 Milano)
- 29-01/5 Kongreso de la Franca Katolika E-Asocio, Lille (P. Bourdon, 7, av. Salomon, F-59000 Lille)
- 30 Limdato por la Internacia Ekzameno

Majo

- 01-29 Internaciaj E-kursoj, Pisanica, Bulgario (DK de BEA, Pf. 30, Smoljan)
- 03-06 12a Tutlanda Kunloĝado, Yaizu-si, Japanio (Sone-bldg. 502, Yoyogi-san-tyōme 46-17, Sibuya-ku, Tōkyō-to, 151 Japanio)
- 04-06 Kultura Semajnfino, Niederwürzbach, FRG (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)
- 05-06 Trilanda renkontiĝo, Maastricht, Nederlando (Esperanto Centrum, Frankenstr. 149, 6224 GM Maastricht)
- 05-19 Printempa E-Feriado, Zakopane, Pollando (Buroo de Internacia E-Interŝanĝo, M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz)
- 11-13 74a Skota Kongreso, Alloa, Britio (A. Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge, ML5 1LE)
- 13-20 Jubilea Feriosemajno, Krommenie, Nederlando (M. Hijne-Karstens, Bestevaerstr. 26, 1566 DH Assendelft)
- 17-19 Simpozio: Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia — eŭropa — lingvo, Parizo, Francio (L'Université René Descartes, 12, rue Cujas, F-75005 Paris)
- 20-26 4a Ĉebalta Printempo, Mielno, Pollando (Juventur, str. Jagiellońska 12, PL 85-067 Bydgoszcz)
- 20-03/6 Konferenco pri Kulturo, Bydgoszcz, Pollando (Buroo de Internacia E-Interŝanĝo, vd. supre)
- 26-27 27a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, Kobe, Japanio (KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka, Oosaka-hu 561)
- 26-30 Internacia E-Renkonto, Gdańsk, Pollando (Buroo de Internacia E-Interŝanĝo, vd. supre)
- 27-30 Seminario pri "Esperanto por la infanoj", Gdańsk, Pollando (Juventur, vd. supre)
- 30-03/6 Internacia E-Renkontiĝo, Bydgoszcz, Pollando (Juventur, vd. supre)

Junio


- 01-05 Internacia Junulara Renkontiĝo, Unterkirnach, FRG (E. Kuhl, Löwengasse 16, D-6101 Rossdorf 1)
- 01-29 Internaciaj E-kursoj, Pisanica, Bulgario (DK de BEA, Pf. 30, Smoljan)
- 02-04 Jarkongreso de Sveda E-Federacio, Kungälv, Svedio (M. Andreasson, L. Tolsered P.L. 2265, S-435 90 Hisings Kärä)
- 02-18/8 Internacia Feria Altlernejo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (IFA, Pf. 621, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

- 03-25/7 Internacia Buslinio "Esperanto", Pollando-Ĉeĥoslovakio-Hungario (Juventur, vd. supre)
- 04-09 Bjalistoka E-Printempo, Białowieża, Pollando (Buroo de Internacia E-Interŝanĝo, vd. supre)
- 10-23 Esp. rondveturo en suda Italio (A. Foa, via S. Maurilio, 7, I-20123 Milano)
- 11-16 Internacia Studsemajno, Kajaani, Finnlando (Internacia Studcentro, SF-17300 Vääksy)
- 15-17 7a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, Porto, Portugalio (Portugala E-Asocio, R. Dr. João Couto, 6R/C.-A, P-1500 Lisboa)
- 15-21 31a IFEF-Kongreso, Turku, Finnlando (p/a Syrjänen, Hämeentie 70 D 63, SF-00550 Helsinki 55)
- 15-26 6a Internacia E-Feriado, Międzyzdroje, Pollando (Buroo de Internacia E-Interŝanĝo, vd. supre)
- 17-25 Mezlerneja Ripoztendaro, Szolnok-Tiszaliget (HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 22-24 Internacia Somernokta Festo, Herzberg, FRG (P. Zilvar, Grubenhagenstr. 8, D-34200 Herzberg)
- 24-14/7 E-Labortendaro Internacia, Jaszberény, Hungario (A. Farkas, Deak F. u 4, H-5100 Jaszberény)
- 25-29 E-kursoj diversgradaj, Turku, Finnlando (S. Salmivaara, Puistokatu 15 b A 25, SF-20100 Turku 10)
- 27-20/8 Internacia Aviadillinio "Esperanto", Pollando-Bulgario (Juventur, vd. supre, aŭ DK de BEA, Pf. 30, Smoljan, Bulgario)

Julio

- Julio 12a Pionira Internacia Tendumado, Zanka, Hungario (HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 01-08 Libera Tendumado, Eupen, Belgio (NEJ, Raadhuisstr. 18, 6161 GD Geleen, Nederlando)
- 01-14 Internaciaj E-kursoj por popollernejanoj, Pisanica, Bulgario (BEA, Pf. 30, Smoljan)
- 01-11/8 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-11000 Praha 1)
- 02-06 Somera Universitato de Jyväskylä, Finnlando (T. Tyynelä, Taidepolku 6 L, SF-40720 Jyväskylä 72)
- 02-21 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo, vd. supre)
- 07-15 Internacia E-Semajno, Vääksy, Finnlando (Internacia Studcentro, SF-17300 Vääksy)
- 08-14 17a Somera E-Universitato, Gyula, Hungario (SEU, 48-as u. 11, H-5700 Gyula)
- 08-14 2a Internacia Medicina E-Konferenco, Hódmezővásárhely, Hungario (K. Faragó, Poŝtkesto 89, H-6801 Hódmezővásárhely)
- 13-20 52a Kongreso de SAT, Swanwick, Britio (29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex RM6 6EB)
- 16-21 39a Kongreso de Hispana E-Federacio, Gijón, Hispanio (Grupo Esperantista Jovellanos (Ateneo), Enrique Cangas, 25, Gijón)
- 16-25 12a Internacia Renkontiĝo Naturamika, Abaliget-Pécs, Hungario (HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 16-29 Internaciaj E-Kursoj por mezlernejanoj, Pisanica, Bulgario (DK de BEA, Pf. 30, Smoljan)

- 17-31 12a Renkontiĝo de Freinet-Edukistoj, Landerneau, Francio (A. Lemerrier, 6 rue Beaumarchais, F-29200 Brest)
- 19-28 13a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Locarno, Svislando (ILEI, Casella Postale 22, I-54100 Massa, Italio)
- 20-27 35a Internacia Junulara Kongreso, Austerlitz, Nederlando (35a IJK, Postbus 4083, 9701 EB Groningen)
- 23-11/8 Kulturaj aranĝoj de Grésillon: Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo, vd. supre)
- 28-04/8 64a Universala Kongreso de Esperanto, Lucerno, Svislando



- 28-04/8 Somera Renkontiĝo de JEB, Windsor, Britio (JEB, 25 Pierson Rd., Windsor, Berks, SL4 5RJ)
- 29-11/8 Somera E-Lernejo, Košice Hamre, Ĉeĥoslovakio (Dr. Elemir Erby, Dom Umenia, CS-041 23 Košice)
- 31-26/8 Somera E-Lernejo, Władysławowo, Pollando (Buroo de Internacia E-Interŝanĝo, vd. supre)

Aŭgusto

- 01-14 Internacia E-kursoj, Pisanica, Bulgario (DK de BEA, Pf. 30, Smoljan)
- 04-11 31a KELI-Kongreso, Bienenberg, Svislando (F. Liechti, Wiesliacher 6, CH-8053 Zürich)
- 07-14 38a IKUE-Kongreso, Luksemburgo (Esperanto-Centro, Pf. 628, Luksemburgo)
- 11-12 66a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, Kobe, Japanio (KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka, Oosaka-hu 561)
- 11-28 Internacia E-Laborbrigado, Békéscsaba, Hungario (L. Földvari, Arpad u. 11, H-5420 Turkeve)
- 12-15 11a Friska Lernejo por Esperanta Lernado, Makino, Japanio (KLEG, vd. supre)
- 13-01/9 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo, vd. supre)
- 15-20 8a Varia Internacia Semajno, Budapest-Eger, Hungario (HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 21-28 SKEMO (Sporto, Kanto, Esperanto, Muziko), Velika, Jugoslavio (Ž. Pehar, Opatijska 41, YU-54000 Osijek)

NOTO; Ni klopodos en nia junia aŭ julia/aŭgusta numero aperigi kompletigon de la kalendaro, pri la aranĝoj dum la finaj monatoj de la jaro. Bonvenas tial detaloj laŭ la ĉi-supra modelo: dato, nomo, loko, lando, kontaktadreso.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

Agnosko kaj... mono

De la 22a ĝis la 24a de novembro 1978 okazis en Zagrebo la 9a Kongreso de Socialista Unuiĝo de la Junularo de Kroatio (SUJK). Inter pli ol 1 000 delegitoj el la tuta Kroatio partoprenis ankaŭ 23 junaj esperantistoj. Kvankam la kunlaboro inter SUJK kaj Kroatia Esperantista Junulara Asocio (KEJA) stariĝis jam pli frue (v. nian numeron de januaro 1978, p. 14), unuafoje en Jugoslavio oficiala esperantista delegitaro partoprenis en oficiala socipolitika kongreso.

Antaŭ la kongreso ampleksa raporto pri la Esperanta agado en Kroatio estis dissendita tra la lando en 40 000 ekzempleroj. La Komisiono por Eksterlandaj Rilatoj de la Unuiĝo en siaj konkludoj akceptis rekomendon, ke ĉiuj junularaj organizoj en Kroatio uzu Esperanton en siaj internaciaj kontaktoj.

Tio ĉi estas nur unu el la lastatempaj oficialaj agnoskoj de Esperanto en Kroatio. La Socialista Unuiĝo — la plej amasa socipolitika organizaĵo en la lando — jam pasintan aŭguston agnoskis la aktivan agadon de la Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo. La Esperanto-movado en Jugoslavio ĉiam pli serioze aktivas en aliaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri edukado de la junularo, kaj tio speguliĝas en la granda financa subteno, kiun la socio donas por Esperanto: en 1978 oni ricevis por diversaj projektoj pli ol 100 000 guldenojn.

El poŝtosako

Januara estrarkunsido

La estraro de TEJO kunsidis en Ateno frue en januaro. Dekpaĝa protokolo atestas pri la efika laboro de la nuna gvidantaro de TEJO. La estraro dediĉis multan tempon por studi detalojn pri venontaj Internaciaj

Junularaj Kongresoj (IJK). Tiu okupiĝo pri la IJK indikas la centran gravecon de la ĉiujara junulara kongreso en la agado de TEJO. La nova Kongresa Regularo, kiun oni nun diskutas, suplementos la novan Statuton de TEJO, kiu validas jam de sia aprobligado fare de UEA en Varno.

ij

Bulgara sekcio de TEJO

En decembro 1978 Bulgara Esperanto-Junularo okazigis dutagan studentan renkontiĝon en Sofio. 170 gestudentoj partoprenis en la programo, kiu inkluzivis prelegon kaj diskuton pri la temo "Kion donas Espe-



ranto al la junularo? ". Oni spektis ankaŭ filmon pri la 34a IJK en Veliko Tarnovo kaj reekzamenis la kongresajn spertojn.

E.G.

Kanada sekcio de TEJO

Oni notu, ke la kontaktadreso de Junularo Esperantista Kanada estas nun ĉe la nova prezidanto Yves Bellefeuille, 2372 Haddington Crescent, Ottawa, Ontario, K1H 8J4.

Adressaĝo Tsiturides


D-ro Savas Tsiturides, prezidanto de TEJO, havas novan adreson: Aĥarnon 360 kaj Kaftantzoglu, Athinai 907, Greklando.

Ekspozicio okaze de la IJK

Okaze de la 35a Internacia Junulara Kongreso en Austerlitz, la loka grupo aranĝos ekspozicion pri Esperanto. La intenco estas montri ankaŭ ricevitaĵojn salutkartojn. Bonvolu sendi viajn salutojn, filatele afrankitaĵojn, al s-ino C.H. Schout, Const. Huygenslaan 23, 3705 SN Zeist, Nederlando.

La plej nemovada revuo

El ĉiuj revuoj aperantaj en la Esperanto-movado "kontakto" estas la plej nemovada. Ĉiu numero de tiu kvaronjara periodaĵo de TEJO dediĉiĝas al monde aktuala temo — en 1978 tio estis: malarmado, homaj rajtoj, edukado, infanoj. Temas fakte ne tiom pri revuaj numeroj kiom pri 20-paĝaj broŝuroj kiuj enfokusigas aktualajn. Ĉion ĉi jam malkovris ĉ. 700 personoj, kiuj regule ricevas la revuon. Kiam vi bonvolos malkovri tion al vi mem? Se vi estas malpli ol 26-jara, malkaŝu al ni almenaŭ vian naskiĝdaton kaj "kontakto" venos al vi aŭtomate, pro via individua membreco en UEA/TEJO. Jarabono: 16,50 (por Nederl. 17,16) gld.



kontakto

Francio

• Antaŭ kelka tempo kreiĝis ankaŭ triagrada kurso de Esperanto en la Universitato de Clermont-Ferrand, kie la instruado de la Internacia Lingvo daŭras jam plenan jardekon (Ekde 1969). Nun la studado de Esperanto en la Universitato daŭras entute tri jarojn; en la unua jaro oni akiras la bazajn sciojn, en la dua la studentoj perfektigas sian konon de la lingvo kaj ricevas enkondukon al la esperantologio, dum la tria studjaro dediĝas al la Esperanta literaturo. Ĝis nun la kursojn ĉiujare sekvis inter 30 kaj 40 gestudentoj; en 1978 sukcese trapasis ekzamenon 33 kandidatoj. Kiel en Aix-en-Provence, alia franca universitato kie oni instruas Esperanton, ankaŭ en Clermont-Ferrand la Internacia Lingvo estas elektebla kiel parto de ŝtata ekzameno, kun universitata diplomo. La instruadon gvidas prof. Pierre Janton, estro de la katedro pri anglistiko.

Egiptio

• D-ro Tadros Megalli, egipto de longe loĝanta en Eŭropo, al siaj konstantaj streboj vigligi Esperantan laboron en Egiptio aldonis lastatempe plian provon. Li prelegis pri Esperanto kaj gvidis kurson en la filio de la junulara organizaĵo YMCA en Aleksandrio. UEA helpis per disponigo de senpagaj lerniloj.

Turkio

• Dum la pasinta jaro okazis du renkontiĝoj de turkaj esperantistoj. La unuan partoprenis nur 11, sed la duan jam 28 personoj. Krome, en Istanbul okazis ekspozicio de la Esperanta literaturo. UEA dum 1978 sendis al Turkio 40 senpagajn lernolibrojn kaj kvanton da informa materialo.

Srilanko

• Ĉeĥdevena budhana monaĥo Nyanasatta Thero estis dum pluraj jardekoj, ĝis antaŭ nelonge, la sola firma ligo inter Esperanto kaj tiu azia lando. En la lastaj jaroj aktiviĝis ankaŭ aliaj esperantistoj en Srilanko. Tamen, la monaĥejo de Nyanasatta Thero (adreso: Verdant Hermitage, Bandarawela, Srilanko) restas ankoraŭ grava por la Movado, ĉar ĝi tra la

jaroj fariĝis parte ankaŭ Esperanta institucio. Ĝi ne estas nur monaĥejo, sed ankaŭ lernejo kaj kultura centro por la loka junularo. La jam 71-jara monaĥo nun serĉas taŭgan posteulon, kiu krom pri Esperanto devus interesiĝi ankaŭ pri budhismo. Detalojn petu ĉe la supra adreso.

Italio

• En la malgranda itala urbo Verbanja Intra, en la regiono Piemonte, okazas tre vigla Esperanta agado. La Internacia Lingvo estas instruata en ses lokaj lernejoj, kaj lastatempe

komenciĝis tie speciala kurso por la urba polico ("urbaj gardistoj"), post tiurilata aprobo de la urba konsilantaro. Verbanja Intra situas proksime al la svisa landlimo kaj pere de tiu speciala kurso volas pretiĝi por la vizito de esperantistoj, kiuj en julio kaj aŭgusto partoprenos la movadajn aranĝojn en Svislando.

Pakistano

• En Jhelum, kie fine de aŭgusto pasintjare okazis kongreso de la nova Pakistana Esperanto-Asocio (v. nian numeron de novembro 1978, p. 190), en februaro ĉi-jare komenciĝis Esperanto-kurso, kiun gvidas s-ro Mustar Abbasi, instruisto kaj aŭtoro de Esperanta lernolibro por urdu-lingvanoj.

Fake

Bibliotekoj

• En Eugene, la Biblioteko de la Universitato de Oregono (Usono) anoncis la starigon de Esperanto-fako, kies katalogo listigas ĉ. 2500 librojn kaj 475 periodaĵajn titolojn. Tiu plej granda biblioteka fako pri Esperanto en Usono ŝuldiĝas al la donaco de s-ino Doris Connor, kiu al la biblioteko transdonis la kolekton de sia forpasinta edzo George Alan Connor, iama redaktoro de *American Esperanto Magazine*. La katalogo *G.A. Connor Esperanto Catalog* estas havebla kontraŭ 5,00 usonaj dolaroj ĉe: s-ro E. Kemp, Acquisitions - Special Collections, University of Oregon Library, Eugene, Oregon 97403, Usono.

Tradukistoj

• Internacia Federacio de Tradukistoj okazigos sian kongreson por 1980 en Varsovio. Laŭ informo de s-ro J. Uśpieński, eblas prezenti referaĵojn ankaŭ fare de esperantistoj, pri bel-etra, scienca kaj teknika tradukado. Pri ĉio ĉi kontaktu: Jerzy Uśpieński, Poŝtkesto 302, PL-00-950 Warszawa.

Turismo

• Iam estis grava novaĵo ĉiu turisma prospekto, kiu aperis en Esperanto. Nun fariĝis malfacile eĉ mencii ĉiujn el ili. Nur lastatempe aperis ampleksaj turismaj broŝuroj: pri Kolonjo, Unterkirnach kaj Stuttgart en FR Germanio, Lucerno (pro la 64a UK)

kaj Lokarno (pro ILEI-konferenco tie) en Svislando, pri Trentino en Italio, Nancy kaj Gray en Francio, Lodzo en Pollando, Jyväskylä en Finnlando kaj pri pluraj aliaj. Kiel kutime, oni povas peti tiujn prospektojn de la turismaj oficejoj en la koncernaj lokoj.

Prelegvojaĝoj

• Ŝajnis antaŭ kelkaj jaroj, ke la prelego fariĝas eksmoda publika aranĝo. Tamen, nun denove aktuali-



ĝas — almenaŭ en la Movado — prelegoj kaj prelegvojaĝoj. Krom tiuj, kiujn ni jam menciis antaŭe, okazis fine de la pasinta jaro ankaŭ prelegvojaĝo de

d-rino Lina Gabrielli (sur la foto) en Norvegio, kaj norvega prof. Carl Støp-Bowitz sukcese prelegis en Finnlando. Prof. Støp-Bowitz nun planas prelegi tra Sud-Ameriko, meze de aprilo, lige al sia partopreno en la Simpozio en Marilía (v. la rubrikon Kalendaro, p. 53). S-ro R. Llech-Walter, certe unu el la plej aktivaj movadaj prelegantoj, denove parolis en pluraj sudfrancaj lokoj, i.a. en Kataluna Kultura Centro en Perpignan.

Premioj

- Premio Simondetti, kiun ĉiujare donas Ornitologia Rondo Esperantlingva, iris por la jaro 1978 al Rajna Angelova Konstantinova el Bulgario, pro la 50-paĝa konkursaĵo "Mia verda papageto". S-ino Konstantinova troviĝis ankaŭ inter la premiitoj de la Belartaj Konkursoj de UEA por la jaro 1978.

- F-ino Spomenka Štimec, kiu en la Belartaj Konkursoj 1978 gajnis la unuan premion por originala prozo, verkas ankaŭ en sia gepatra lingvo — la kroata, en kiu jam antaŭ kelkaj jaroj aperis ŝia unua libro. Fine de januaro 1979 ŝi dividis la duan premion por mallonga rakonto en la konkurso de la semajna revuo *Arena* (eldonkvanto 250 000 ekz).

Komerco

- En oktobro 1977 ni notis en ĉi tiu rubriko (p.177) plendon de japanoj, ke la aliaj industriaj landoj faras malmulton por disvastigi sian merkaton en tiu lando. Lastatempe Eŭropa Komunumo decidis elspezi ĉ. 7,5 milionojn da guldenoj por sendi al Japanio spertulojn pri la internacia komerco, kiuj tie dum jaro kaj duono klopodos lerni la japanan lingvon.

Pupteatro

- Komence de februaro, Televido Zagrebo (Jugoslavio) elsendis unu-horan pupteatraĵon en Esperanto, kun skriba nacilingva traduko. Temas pri la prezentaĵo *La teda knabo Pinocchio* en la interpreto de la Pupteatro de Vroclavo (Pollando), filmita dum la 11a Pupteatra Internacia Festivalo en oktobro 1978, kie ĝi gajnis plurajn premiojn. La tradukon faris inĝ. Damir Mikuličić, ĵurnalisto kaj parolisto en la Esperantaj elsendoj de Radio Zagrebo.

Magnetofona Servo de UEA

- S-ro R. Eichholz (R.R. 1, Bailieboro, Ontario, Kanado K0L 1B0) aperigis novan eldonon de la numere ordigita listo de sonbendaj programoj, haveblaj ĉe la Magnetofona Servo de UEA, kies prizorganto s-ro Eichholz estas. La listo estas 31-paĝa broŝuro, kiu priskribas 461 programojn. Enestas ankaŭ ĉiuj aliaj informoj necesaj por mendi la programojn de ĉi tiu unika kolekto. La listo estas havebla kontraŭ unu internacia respondkupono ĉe la supra adreso aŭ ĉe la Libroservo de UEA.

Jermář

- En la 3a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, okazinta inter la 10a kaj 12a de februaro 1979 en ĉeesto de ĉ. 350 personoj, kiel nova prezidanto de tiu aliĝinta landa asocio de UEA elektigis d-ro Jaromir Jermář, 56-jara sociologo postenanta ĉe la Instituto por Filozofio de la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj. D-ro Jermář lernis Esperanton en 1936 kaj jam antaŭe havis gravajn funkciojn en la landa Esperanto-movado. La kongreson ĉeestis ankaŭ d-rino F. Szabó-Felső, estrarano de UEA.

Morocz

- Dum sia jarkunveno, la 17an de februaro, Svisa Esperanto-Societo elektis novan — junan — prezidanton. Tio estas s-ro Istvan Morocz, kiu lernis la Internacian Lingvon antaŭ trideko da jaroj, en Budapeŝto ĉe Julio Baghy. Li poste vivis en Skandinavio kaj Kanado, por fine instaliĝi en Zuriko, kie li havas propran reklamgrafikan atelieron

Persone

kaj iom okupiĝas pri Esperanta eldonado.

Daŝgupto

- Juna hinda filologo Probal Daŝgupto, kiu dum la lastaj jaroj aktivis en la Laborgrupo de UEA ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, finis doktoriĝajn studojn ĉe la Universitato de Nov-Jorko. Ekde la 1-a de marto li provizore postenos ĉe la Universitato de Melburno, Aŭstralio (adreso: Department of English, University of Melbourne, Parkville, Vic. 3052).

KOREKTO

S-ro Claude Piron, kiu estos rektoro de Internacia Somera Universitato dum la 64a UK en Lucerno, atentigis nin pri eraro en la biografia skizo, kiu pri li aperis en nia februara numero ("Persone", p. 36). S-ro Piron estis tradukisto/protokolisto ĉe UN en Nov-Jorko kaj Monda Organizo pri Sano en Ĝenevo, kaj ne interpretisto, kiel ni erare skribis.

Esperanto en radio

POLA RADIO: La presita programo valida ĝis majo entenas kelkajn ŝanĝojn pri la uzataj ondolongoj. Kvanke la precizaj frekvencoj ankoraŭ ne estas diskonigitaj, notinde estas, ke la matena programo estas dissendata per la ondoj de 200m, 75m, 49m, 41m, dum la ondoj de la posttagmeza elsendo estas 49m, 31m, kaj de la vespera 200m, 75m, 49m, 41m. La horoj restas la samaj. La konstantaj programoj estas jenaj: lunde — "Esperanto-ekspreso" kaj "Aŭskultantoj por aŭskultantoj"; marde — "Aŭskultantoj por aŭskultantoj"; merkredo — "El la vivo de Pola Esperanto-Asocio" kaj "Leterkesto"; vendrede — "Leterkesto"; sabate — "La semajno en Pollando", panoramo de internaciaj eventoj, "Esperanto-ekspreso"; dimanĉe — samaj rubrikoj kiel sabate; ĉiutage — novaĵoj de la radio-ĵurnalo (escepte de dimanĉoj kaj festotagoj), komentarioj pri polaj kaj internaciaj temoj politikaj, soci-ekonomiaj, scienc teknikaj, kulturaj k.a.

VATIKANA RADIO: Por kontentigi la insistajn petojn pri tempo pli longa por la elsendoj en Esperanto, ekde la 4a de januaro surondiĝas nova programo, kiu entenas raportojn pri papaj aŭdiencoj kaj informojn ĝenerale pri la katolika eklezio. Tiu ĉi programo estas aŭskultebla ĉiun ĵaŭdon de 06.15 ĝis 06.30 GMT, per la ondoj 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz) kaj ankaŭ en Romo per la ondoj 93.0 MHz, 96.5 MHz (mod. frekv.). Neniu ŝanĝo pri la dimanĉa elsendo.

RADIO PEKINO: La elsendoj direktitaj al Eŭropo, vendrede kaj sabate de 20.00 ĝis 20.30 GMT, estas nun dissendataj ankaŭ per la ondo de 47.85m (6270 kHz); neniuj ŝanĝoj pri la aliaj jam uzataj ondolongoj.

Pri aliaj detaloj vidu nian numeron de januaro 1979, p. 20, kie aperas kompleta tabelo de la elsendoj.

La membraro de UEA en 1978

Lando	AM	IM	Sume
Albanio	-	1	1
Antiloj nederl.	-	1	1
Argentino	323	64	387
Aŭstralio	112	122	234
Aŭstrio	?	61	61
Belgio	500	193	693
Bolivio	-	1	1
Brazilo	1224	304	1528
Britio	854	354	1208
Bulgario	4100	90	4190
Ĉeĥoslovakio	1595	138	1733
Ĉilio	-	6	6
Ĉinio	-	1	1
Danlando	370	124	494
Egiptio	-	3	3
Ekvadoro	-	2	2
Finnlando	400	248	648
Francio	694	540	1234
FR Germanio	1000	432	1432
Germana DR	500	23	523
Greklando	400	16	416
Hinda Unio	-	9	9
Hispanio	?	137	137
Hongkongo	-	3	3
Hungario	3100	155	3255
Indonezio	-	2	2
Irako	-	2	2
Irano	-	59	59
Irlando	25	8	33
Islando	24	39	63
Israelo	200	47	247
Italio	1194	219	1413
Japanio	1000	328	1328
Jemeno, DR	-	1	1
Jugoslavio	?	173	173
Kanado	178	89	267
Kenjo	-	1	1
Kolombio	-	19	19
Korea Resp.	234	30	264
Kostariko	-	3	3
Kubo	-	15	15
Kuvajto	-	1	1

Lando	AM	IM	Sume
Laoso	-	1	1
Libano	-	1	1
Liberio	-	1	1
Luksemburgo	89	17	106
Madagaskaro	15	5	20
Malajzio	-	1	1
Malavio	-	1	1
Malto	?	1	1
Maroko	-	2	2
Maŭricio	-	1	1
Meksikio	55	24	79
Monako	-	1	1
Nederlando	463	421	884
Nigerio	-	5	5
Norvegio	372	97	469
Nov-Zelando	140	72	212
Pakistano	-	2	2
Panamo	-	2	2
Papua Novgvineo	-	1	1
Peruo	?	33	33
Pollando	4150	112	4262
Portoriko	-	1	1
Portugalio	-	27	27
Rumanio	-	35	35
Salvadoro	-	1	1
Senegalio	-	3	3
Singapuro	-	3	3
Sirio	-	1	1
Soveta Unio	-	93	93
Srilanko	-	3	3
Sud-Afriko	54	19	73
Sudano	-	1	1
Svedio	1240	462	1702
Svislando	198	177	375
Tajlando	-	1	1
Urugvajo	-	4	4
Usono	?	483	483
Venezuelo	?	27	27
Vjetnamio	-	3	3
Zairio	25	6	31
82 landoj	24828	6215	31043

RESUMA DETALIGO DE LA MEMBRO-STATISTIKO DE UEA POR 1977 KAJ 1978

Membro-kategorio	1977	1978
Membro-Jarlibro	906	1 040
Membro-Abonanto	3 882	3 859
Dumviva Membro	986	980
Honora Membro	18	18
Juna M-Jarlibro	109	102
Juna M-Abonanto	198	216
Individuaj Membroj	6 099	6 215
Asociaj Membroj	25 677	24 828*
Membroj entute	31 776	31 043
Societo Zamenhof	243	221
Simplaj abonoj	203	248
Kolektivaj abonoj	2 628	2 873
Pagintoj entute	34 850	34 385

* El tio 6 708 estas junaj membroj, do asociaj membroj de TEJO.

RIMARKOJ KAJ KLARIGOJ

En la apuda laŭlanda statistiko aperas sep demandosignoj en la kolumno AM (asociaj membroj). Tio ne signifas, ke la koncernaj landoj ne havas asociajn membrojn, sed ke ili ĝis nun ial ne sukcesis pagi la kotizon. Inter tiuj landoj troviĝas kelkaj kun relative granda membraro (Hispanio, Jugoslavio, Usono). Kiam venos tiuj kotizoj, ankaŭ la statistiko montros, ke la membraro de UEA iom kreskis en 1978, kio jam montriĝas ĉe la individua membraro. Cetere, pro komparaj celoj, ĉi tie aperas la nombroj pri 1977 kiel en nia marta numero pasintjare, kaj ne la pli definitivaj, kiuj troveblas ĉiujare en la Estrara Raporto.

Oficiala Informilo

N-ro 523

ŜANĜOJ DE KOTIZPERANTOJ MEKSIKA KAJ ISRAELA

Okaze de la ĵusa aliĝo de Meksika Esperanto-Federacio al UEA estas decidite, ke por pli bona kunordigo de la laboroj MEF mem transprenos la peradon de kotizoj por UEA, el la manoj de f-ino Alicia Zepeda E., kiu diligente plenumadis la taskojn de

ĉefdelegito de post 1967. Al ŝi ni adresas varmajn dankojn pro la pasintaj servoj. La membroj en Meksikio bonvolu do turni sin estonte al MEF, Poŝtkesto 10576, México 1, D.F.

Por Israelo estas anoncata nova kotizperanto pro eksiĝo de s-ro Reuven Berlinerblau. Detaloj sekvos.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

US: 219 G. Novak.

SOCIETO ZAMENHOF 1979

AŬSTRAL: 40 M. Chaldecott; 41 A. Einihovici. DANL: 42 Ejnar Hansen. FINN: 43 Irma E. Heikkilä; 44 Irja Klemola; 45 Harri Laine; 46 Aarne Ratalahti; 47 Touko Tähtinen; 48 Anonima. LUKS: 49 Brian R. Moon. NED: 50 I.M.J. Dijkhoff-Lenze; 51 H.C. Luyke; 52 G.B.J. Mantingh. SVED: 53 B. Bengtson; 54 Åke Blomberg; 55 Leif Holm-

lund; 56 Elna Jansson; 57 Tore Johansson; 58 Henrik Karlsson; 59 D. Kullberg; 60 Dagny Lundgren; 61 Greta Nordström; 62 G. Nylin. DANL: 63 J. Pedersen. SVED: 64 Elly Persson; 65 Olle Persson; 66 Folke Pettersson; 67 Eugen Rytenberg; 68 Jan-Olof Svensson.

FRANCAJ KONGRESANOJ ATENTU!

Aperis grava preseraro en la Dua Oficiala Bulteno de la 64a UK (Lucerno). Bonvolu nepre atenti, ke la ĝusta poŝtĉekonta numero de la franca peranto (Unuiĝo Franca por Esperanto) estas 855-35.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 26

(pri la demando vidu nian februaran numeron)

1. Anglikanismo. Pastro Rust estis anglikana paroĥestro, kiu faris la plej grandan parton de la traduklaboro por la *Nova Testamento* en Esperanto, aperinta en 1912. Li predikis ĉe la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo en 1906.
2. Bahaismo. La propono pri internacia lingvo estas unu ero el la instruo de Baha'u'llah (1817-1892), la fondinto de la bahaismo. Pro tio, lia filo 'Abd'ul-Baha (1844-1921) simpatiis al Esperanto kaj rekomendis, ke bahaanoj lernu ĝin.
3. Homaranismo. La ĉefaj publikigitaj verkoj de Zamenhof estas *Homaranismo (Hilelismo)* (1906) kaj *Deklaracio pri homaranismo* (1913).

Isaj Dratwer

PRI INTERNACIA LINGVO dum jarcentoj (DUA ELDONO)

Necesa por ĉiu serioza esperantisto. Entute 360 paĝoj. En la indekso 757 nomoj. Prezo: 30,00 ned. guldenoj plus 10% sendokostoj.

Mendojn akceptas la sola distribuanto: la Libroservo de UEA. La reven-distoj havas la kutiman rabaton.

VESELIN DAMJANOV kantas en esperanto

Tiu bela gramofondisko estis havebla por antaŭmendintoj dum la 63a UK en Varno. Fine, nun ĝi estas havebla ankaŭ por la aliaj klientoj de la Libroservo de UEA, kiu aĉetis la tutan restantan stokon kaj por la samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj donas 33-procentan rabaton. Estas riske atendi! Mendu tuj!

VESELIN DAMJANOV KANTAS EN ESPERANTO. Pianakompano de E. Komarov. Sofia: Balkanton, 1978. 30cm. 33t/m, duflanka, stereofona. BOA 2180. Dek du kantoj en profesia interpreto de esprimriĉa baritono. Prezo: 18,00 (por Nederlando 21,24) gld., plus sendokostoj 10%.

Ekzistas ankaŭ manuskripto de alvoko al kongreso por neŭtrale homa religio.

4. Islamo. El la plumo de d-ro Italo Chiussi estas la traduko de *La Nobla Korano*. Li verkis ankaŭ esejon pri la islamismo kaj ĝia kulturo: *Je la Flanko de la Profeto* (1978).

5. Kvakeroj aŭ Societo de Amikoj. M.C. Butler estis unu el la fondintoj de Kvakera Esperantista Societo (KES) en 1921. La fratinoj Peckover per mondonaco ebligis la publikigon de la zamenhofa traduko de la *Malnova Testamento*. Edmond Privat verkis libron titolitan *William Penn, proponanto de Eŭropa Parlamento* (1960). Penn estis brita kvakero, kiu fondis la kolonion Pensilvanio en Nordameriko.

6. Mariavitismo. Tiu ĉi katolika eklezio, sendependa de Romo, estis fondita en Plock laŭ revelacio de Patrino Maria Kozłowska. Mariavita Esperantista Ligo estis starigita de pastro Adam Furmanik en 1931.

7. Oomoto. Ĝi estas novspirita movado fondita en 1892 de "diposeda" s-ino Nao Deguĉi (1836-1918). Ŝia adoptita filo Majstro Onisabro Deguĉi (1871-1948) eklernis Esperanton en 1923. La movado aperigas la internacie faman Esperanto-revuon *Oomoto*.

8. Romkatolikismo. La Vatikana Radio disaŭdigas programojn en la Internacia lingvo dimanĉvespere inter 20.05-20.15h. kaj ĉiŝaŭde inter 6.15-6.30 laŭ la horsistemo de Greenwich. Programkajero estas ricevebla de Radiovatikana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

9. Spiritismo. La Federação Espírita Brasileira (Brazila Spiritisma Federacio) en Rio eldonas librojn pri la spiritisma doktrino kaj ankaŭ Esperanto-lernilojn kaj beletron.

10. Teozofio. Kunfondinto de la teozofia movado estis Helena P. Blavatsky, kies verko *La voĉo de l' silento* estis eldonita en Esperanta traduko en Amsterdamo en 1973. Teozofia Esperanta Ligo estiĝis en 1911 kaj en 1913 estis publikigita ĝia organo *Espero teozofia*.

DEMANDO 27

(la respondo aperos en nia aprila numero)

Lastatempe la literatura ĝenro scienc-fikcio aŭ fantazia scienco havis impetan evoluon ĉie en la mondo kaj ankaŭ en Esperanto. Tiu ĉi demando temas pri kvin inventaĵoj, kiuj estas priskribitaj sur la paĝoj de scienc-fikciaj verkoj en Esperanto. Ĉu vi povas nomi la verkon kaj la aŭtoron? Inter la verkintoj troviĝas du poloj, du hungaroj kaj unu japano. Tri el la verkoj estas noveloj, kaj po unu romano kaj dramo.

A. Scienculo inventas metodon kapti fotografaĵojn per Rentgen-radioj, eĉ kiam la persono radio-grafita estas malproksime de la aparato. Ĉar temas pri iksaj radioj, nur skeleto aperas sur la bildo. En hotel-ĉambro la inventisto montras

al amiko, kiel funkcias la aparato, fotografante du geamantojn en apuda ĉambro. La virino estas la edzino de la amiko de la scienculo.

B. Aparato konsistanta el aero-optikaj plataĵoj kaj merkatoraj montriĵoj funkcias per la Co-lumo kaj R-radioj. Per tiu inventaĵo homoj povas ne nur vidi ĉion, kio okazis en la pasinteco, sed ili povas ankaŭ vojaĝi al foraj lokoj kaj partopreni en historiaj eventoj. La inventisto, kiu malkovris la Co-n en la radiuma radiaro, estis la "instruitulo, eksperimentisto kaj eltrovanto" Mateo Fromaĝi.

C. Tuta aro da inventaĵoj estas funkciigita fare de la aliplanedaj teknokratoj Abo kaj Azo kaj la teknokratino Noza. La sferofono aŭdigas la muzikon de la kosmo, la teroskopo montras la tersurfacon de malproksime, kaj la astroskopo aperigas bildojn pri vivo sur planedoj kaj satelitoj. La tempotelegrafo, inventita de Xoxo, projekcias sur ekranon bildojn postrestintajn en sferondoj, kunigante oscilantajn erojn, kiuj konservas bildojn pri

pasintaj eventoj, ne videblaj por okuloj.

Ĉ. La elektronikisto Oln Hallen invitas sian amikon, la muzikiston Edmar Dens, al koncerto, kiun faras la kompozono. Ĝi estas elektronika aparato, kiu post manipulado de ĝustigiloj, memstare konstruas sonvariaĵojn kaj ludas la verkojn de pluraj komponistoj, sed nur tiujn, kiujn ili ankoraŭ ne publikigis. Laŭ ordonoj de la aŭskultanto, la kompozono povas ankaŭ komponi muzikon sur matematika bazo, ludante ĝin per neekzistantaj muzikiloj kaj kreante tute novan muzikon.

D. Juna elektroingeniero inventis elektronikan tradukmaŝinon por Esperanto. La TRADUK IKSO funkcias ambaŭdirekte, farante dekaj al-tradukojn, kaj povas traduki poemojn eĉ kun rimoj. Per ĝi la inventisto gajnis premiojn en la Belartaj Konkursoj, sed li ricevis ŝokon, kiam li programis sian maŝinon por okupiĝi pri korespondadoj kun lia rivalino por beletraj premioj, f-ino Beltali.

Dianetiko: La moderna scienco pri mensa sano. Informojn kontraŭ 2 respondkuponoj: Ludoviko Lazaro, 1 rue F. Magisson, F-75015 Paris.

Pri lingvoj, libroj kaj muziko volas korespondi 17-jara junulino: Lilia Zlatanova, Klincovska 29, BG-2500 Kjustendil, Bulgario.

LA KANCERKLINIKO, trimonata politika kaj kultura revuo, sendependa, sen tabuoj, ofsetiganta, aperigos sian dekan numeron en aprilo. Bildrakontoj, desegnoj, noveloj, poezio, rubrikoj (kino, grafik-esprima literaturo ktp.), artikoloj. Provezemplero 3 IRK. Abono (4 sinsekvaj n-roj) 24,00 FF. Ĵak LE PUIL, 5, Place Lavoisier (apt. 61), 93380 PIERREFITTE, Francio. Pĉk. Paris 12 729 73 X.

Matvijŝyn, P.B. 157, SU-252001 Kiev: Pentroartajn b.k., kino-geartistojn, belajn kalendaretojn. Respondos.

La Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj nun ekzistas unu jaron. Interesatoj skribu kun respondkupono al s-ro Peter Danning, 44 Morley Road, Twickenham TW1 2HF, Anglio.

Esperanto-Klubo, 31 rue Tréfilerie, F-42100 Saint Etienne, Francio, festos 75an datrevenon per granda ekspozicio. Sendu bildkartojn, leterojn, afiŝojn, Esperantaĵojn. Respondo garantiata.

LEONOJ. UEA starigas novan kunlaboron kun Leonaj Kluboj Internaciaj kaj petas, ke Esperanto-parolantaj anoj de tiu internacia serva organizaĵo anoncu sin al nia Centra Oficejo. Dankon!

Scipovantoj de sanskrito serĉas: Andrej V. Jakovlev, Kaliajevskaja 5-212, Moskva, Soveta Unio.

Junulara Kulturarta Esperanto-Grupo povas prezenti ankaŭ ĉe vi sian interesan, tre amuzan kaj diversspecan programon. Informojn donas: Ljubiŝa Stefanoviĉ, Ŝantiĉeva 22, 18000-NIŜ, Jugoslavio.

300 gelernantoj, 13-35-jaraj, el tuta Hispanio, bezonas korespondi tutmonde kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, bildkartojn. Ĉiam validas. Kursgvidanto: Félix Navarro, Calixto III, 36, Valencia-8, Hispanio.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton. Dankon!

26-jara muzikistino deziras korespondi kun ĉiuj landoj (precipe eŭropaj), pri Esperanto, muziko, pentroarto. Interŝanĝas diskojn, Esperanto-librojn, glumarkojn: Natali Aroloviĉ, Gogolja 12-7, SU-446010 Sizranj Kujbiŝevskoj obl. Soveta Unio.

Esperanto-Oazo. Sub tiu nomo mi projektas konstrui dometon en Hispanio. Disponebla tereno: 8 000 m²; necesas financaj partoprenantoj. Interesatoj skribu al: Aquilas Sanz, Staglitzer Damm 5, D-1000 Berlin 41, Germanio.

Naturistoj/nudistoj, ankaŭ en netranspagipovaj landoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Petu informojn kaj aliĝilon ĉe H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germ.

37-jara blinda juristo kaj muzikisto deziras korespondi tutmonde: d-ro Árpád Péter, Széchenyi u. 14, H-2600 Vac, Hungario.

Vojaĝante al Ĉeĥoslovakio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.

Geinstruistoj kaj gepatroj, instigu viajn gelernantojn kaj gefilojn, 5-15-jarajn, partopreni konkurson okaze de Internacia Jaro de la Infano. Ili faru desegnaĵojn, akvarelojn k.s., po 1-3 bildoj; grandeco maksimume 40x35 cm. Temo: "Kion mi mem esperas kaj kore deziras al ĉiu infano en la mondo". Ĉiu partoprenanta infano ricevos diplomon de Sveda UNICEF-komitato, kiu publike ekspozicios la bildojn en svedaj urboj. Krome premioj por la plej bonaj laboraĵoj. Skribu nomon, aĝon, sekson kaj adreson dorsflanke de la bildoj. Sendu komence de 1979, lastdate la 10an de aprilo. Adresu al la organizanto: INTER-grupo, Pf. 55028, S-400 53 GOTENBURGO, Svedio.

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Ĵus — kaj fine, post dujara atendado — aperis ĉi tiu scienca analizo de la fenomeno de la Internacia Lingvo Esperanto. Ampleksa enkonduko ■ Fonetiko ■ Morfologio ■ Sintakso ■ Leksiko kaj semantiko ■ Fonetikaj simboloj ■ Bibliografio (88 eroj) ■ Indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld. (Ned. plus 4%)

Du belaj libroj



Heinrich Böll



**La perdita
honoro de
iu Katarino
Blum'**

Bleicher Verlag riĉigas la movadan libromerkaton per du belaj, profesie faritaj volumoj, el la plumo de literaturaj revoluciulo kaj nobelpremiito:

TRIGROŜA ROMANO (1934), Bertolt Brecht (1898-1956). El la germana trad. Karl Schulze. Gerlingen: Bleicher Verlag, 1977. 374p. 19cm. ISBN 3-921097-34-7. Prezo: 24,00 guldenoj.

LA PERDITA HONORO DE IU KATARINO BLUM', (1974), Heinrich Böll (1917 -). El la germana tradukis Rikardo Ŝulco. Gerlingen: Bleicher Verlag, 1978. 154p. 19cm. ISBN 3-88350-500-5. Prezo: 16,00 guldenoj.

La Libroservo de UEA donas rabaton de 33% ĉe samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LA VERKO DE LA JARO

1976: ĈU VI KUIRAS ĈINE?
1977: DE TEMPO AL TEMPO
1978: la abonantaro de
LITERATURA FOIRO
asignos la premion
per sekreta referendumo

ABONU KAJ VOĈDONU

ROMULO GALLEGOS:

DOÑA BÁRBARA

fama sudamerika romano en la traduko de F. de Diego. Caracas: VEA, 1975. ISBN 84 399 2885 8. 16,20 gld.

UEA estas nun la ĉefdistribuanto de la Esperanta eldono. "La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia arta prozo kaj riĉigis nian lingvon per libro kies ĝuado en Esperanto ne estas sub tiu de la legado en la hispanlingva originalo. Kelkloke la estetika ĝuo estas pli diafana kaj senpera en la tradukita teksto, ol en la originala, dank' al la bravura manipulado de la latentajoj en Esperanto kaj al la suverena agordado de ĉi ties esprimrimedoj." Juan Régulo

VOLONTULA SERVO DE UEA:

Aliĝu al la movada lernejo

Dum kelkaj lastaj jaroj, ĉ. 15 personoj el deko da landoj de kvar kontinentoj frekventis tiun unikan lernejon de la Esperanto-movado. Jes, oni helpas kaj serioze laboras tie. Sed, krome, ĉiuj ĝisnunaj laborintoj lernis amason da aferoj pri la Movado kaj komencis orientiĝi en kaj pri ĝi. Pluraj lernis tutajn metiojn: kompostado, teknika redaktado, librovendado, fotado ktp.

Ĉu vi ŝatus aliĝi al tiu lernejo? Ni nun denove serĉas volontulojn, principe por unujara periodo. Memoru tamen, ke necesas esti malpli ol 29-jara, bone koni Esperanton, havi tajpkapablon kaj esti lernema. Pri detaloj skribu baldaŭ al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

ALARMO! Vekiĝu! Savu nin!

de la M/I

Je ĉi tiu alvenpunkto de la ĝisnuna enorme malracia progreso, aŭ ni realigas urĝege la SUPERDEMOKRATAN MONDORGANIZON, aŭ ni nepre falos en la abismon de memekstermo. Tria elirvojo ne plu restas al la HOMARO.


Irante laŭ la ĝisnuna vojo, krom la atoma kaj ekologia minacoj, la sciencistoj malkovros mil aliajn novajn rimedojn por konsenti — eble neintence — al la politika gvidantaro tutmonda, realigi la finan masakron de la tuta Homaro. Memtrompas sin, do, la sciencistoj, kiam ili asertas, ke nur la politikestroj kulpas pri la freneza, anstataŭ saĝa, uzo de la sciencaj eltrovoj. Tiamaniere ili — ĉu malice, ĉu malprudente — forgesas mem esti sur la sama ŝipo, kune kun la tuta Homaro. Ili forgesas, ke ĉiu terloĝanto jam estas kunligita al la aliaj je la sama sorto. Okaze de posta ŝippereo, la politika subularo tutmonda povos danki tiel al la sciencistoj kiel al nesufiĉa profesieco de la politika gvidantaro. Klientoj politikaj ĉiulandaj kaj ĉiuspecaj v e k i ĝ u !

Informoj* ĉe:

* kontraŭ almenaŭ tri respondkuponoj aŭ egalvaloro.
(Bonvolu tajpi vian adreson).

MONDHARMONIIGA INSTITUTO
via Sport, 18, 40065 Pianoro, Italio

ESPERANTO- LOGIAJ STUDOJ



WÜSTER



Dum la pasintaj du jaroj, en ĉi tiu revuo disvolviĝis interesa diskuto pri Eugen Wüster kiel esperantisto. Leviĝis pluraj gravaj demandoj pri la rolo, kiun Wüster ludis kaj — precipe — kiun li eventuale estus povinta ludi por Esperanto. Ŝajnas tamen, ke post tiu diskuto la movada staturo de Wüster estas eĉ pli granda, ol oni supozis antaŭe. Kiel ĉe lia sciencista kariero ekstermovada, tiel ankaŭ ĉe lia kontribuo al Esperanto, oni unuanimas pri la genieco de Wüster. Nun venas libro, kiu pretendas unuafoje sisteme argumenti tiun esperantologian geniecon de Wüster:

LA LIBROSERVO
DE UEA ESTAS
ĈEFA DISTRIBU-
ANTO DE ĈIUJ
TK-ELDONAĴOJ.



ESPERANTOLOGIAJ STUDOJ, Eugen Wüster (1898-1977).
Redaktis Reinhard Haupenthal. Antverpeno/La Laguna: TK/
Stafeto, 1979. 254p. 21cm. Popularscienca eldonserio n-ro 5.
ISBN 90 6336 005 3. Kolora kovrilo. Prezo: 24,00 guldenoj.
NOTO: Ĉe mendo de TK-libroj, petu senpagan bultenon de la eldonejo.